

1977 februaro

70-a jaro

n-ro 854 (2)



aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

NE ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio
nieuwe binnenweg 176 —

(en konsultaj rilatoj kun unesko)
rotterdam-3002 — nederlando



Vi trovos

ke ĉi tiu numero alportas kelkajn informojn pri entreprenoj, kies realigo povus fariĝi ne nur signifa, sed iusence eĉ epokfara. Unuavice temas pri la paŝoj, kiujn entreprenis la Estraro (v. raporton pri ĝia januara kunsido sur la p. 22) por reorganizi la Centran Oficejon de UEA. Pro la fundamenta graveco de la verko, ankaŭ la decido eldoni kompletigitan kaj reviziitan "Plena analiza gramatiko" signas mejloŝtonon en la plua evoluo de la lingvo kaj sekve ankaŭ de la Movado. Ni tamen emus konsideri alian estraran decidon vere epokfara, revolucia. Temas pri aera ekspedado de la revuo al ĉiuj ekstereŭropaj abonantoj, kion ni jam aludis ĉi-loke en nia decembra numero pasintjare kaj kion ankoraŭ devos konfirmi la Komitato de UEA, por ke la decido ekvalidu en 1978. Tiu decido, kiam ĝi estos plenvalida, signos la plej grandan paŝon en la movada historio survoje al vera tutmondigo de la Esperanto-movado kaj do ankaŭ de la Internacia Lingvo. Ĝi signifos ankaŭ, ke la Movado fine komencas konscii pri la ĉeftraĵto de la epoko en kiu ni vivas, ĉar ja temas pri la epoko de rapida, intensa kaj amasa informado.

Cetere, vi havas en la manoj riĉan kaj diversteman numeron de la revuo. Ni do esperu, ke ĝi ne instigos vin al multaj plendoj, sed anstataŭe donos al vi almenaŭ iom da kuraĝigo por novaj faroj.

Enhavo

- 21 Pluralismo kaj unueco (d-ro Pol Denoël)
- 22 Januara kunsido de la Estraro de UEA: Nova etapo en la evoluo de UEA
- 24 Prunteprenita intervjuo: La diferenco inter "ludi rolon" kaj "esti" (A. Harkovskij intervjuas d-ron M.I. Isaev)
- 25 Lingvistika kunveno en Nov-Jorko: Studoj pri Schwartz
- 26 Eĥoj el Bruselo: Nek lingvo nek pasporto por Eŭropo (Michael Hornsby)
- 27 Vojaĝimpresoj: Kvar aziaj urboj (E.J. Woessink kaj A. Woessink-Nagata)
- 28 La lingvo en la praktiko: Miĉiko kaj Mikiko (Sonoko Kuzume)
- 29 La unua kolombia kongreso: Vigle en Sud-Ameriko (J.H. Hoekstra-Sieders)
- 30 Islandaj manuskriptoj: Kvindek bovidoj por unu libro (Árni Böðvarsson)
- 32 Recenzoj ("La akvariinfanoj", "Ĉu vi kuiras ĉine?", "Esperanto o Interlingua")
- 33 Laste aperis . . . (novaj eldonaĵoj en aŭ pri la Internacia Lingvo)
- 34 TEJO-paĝo: La pleja IS (Guido Brandenburg), Unesko serĉas junajn volontulojn: Duonjaro en Parizo? (H.T.)
- 35 Kongresa komuniko: Novaĵoj pri la 62a Universala Kongreso en Islando
- 36 Loke — Fake — Persone (mallongaj novaĵoj)
- 37 Nekrologoj (D. Armand, J. Chapellier, A. Edmondson, E. Gregory, E. Morariu)
- 38 Oficiala informilo el la Centra oficejo de UEA
- 39 Ekzameno E (Bernard Golden), Anoncetoj
- 40 Esperanto en radio — kompleta tabelo (G. Larglantier)

La kovrilo

Semajno de internacia amikeco okazos inter la 20a kaj 26a de februaro. Ni tial dediĉas la kovrilon al tiu nobla aranĝo, pri kiu ni skribis en nia januara numero (p.5). Atentaj legantoj rimarkos, ke la kovrilaj vizaĝoj, reprezentantaj ĉiun angulon de la mondo, jam aperis en niaj antaŭaj numeroj. Ankaŭ tiu teknikaĵo estu pruvo, ke la Esperanto-movado ne praktikas internacian amikecon okaze, sed ĝia tuta historio kaj ĉiu ĝia paŝo estas unu sincera kaj daŭra strebado al amikeco inter la homoj kaj popoloj de nia disigita mondo.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando. Telefono: (010) 36 15 39.

Aperas monate (escepte de aŭgusto). Fondita en 1905 de M. P. Berthelot (1881-1910). Legantoj en 86 landoj. Redaktoro: Simo Milojević.

Abonprezo por unu kalendara jaro: 30,00 gld. (kun membreco kaj Jarlibro 50,— gld.) Unuopa ekzemplero 3,— gld. Por jara aerpoŝto aldonu: Oceanio 19,25; Sud-Ameriko 16,50; Suda Afriko, Azio 13,75; Meza kaj Norda Ameriko, Mezoriento, Meza kaj Norda Afriko 11,— gld.

Anonctarifo: 1p. 500 gld. 1/2p. 265 gld., 1/4p. 145 gld., 1/8p. 85 gld., 1/16p. 55 gld. Anonctarifo por ne-Esperantaj komercaj entreprenoj estas duobla. Ripetrabato 20%.

Banko: Bank Mees & Hope, Cool-singel 93, Rotterdam-3002 (konto n-ro 25.52.89.804).

Poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Telegramadreso: ESPERANTO ROTTERDAM.

Estraro de UEA

Prezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj kaj kulturo: D-ro H. Tonkin, 35 Violet Lane, Lansdowne PA 19050, Usono; tel. (215) CL9-8821.

Vicprezidanto kaj estrarano pri landa kaj regiona agado: D-ro W. Bormann, Schärstr. 26, D-205 Hamburg 80, FR Germanio; tel. (040) 7384508.

Vicprezidanto kaj estrarano pri faka agado: Prof. d-ro C. Støp-Bowitz, Camilla Colletts vei 3, Oslo 2, Norvegio; tel. (472) 448085.

Ĝenerala sekretario kaj estrarano pri administrado, komerco, industrio kaj diskonigo de UEA-agado: E.L.M. Wensing, Dennenstr. 9, B-3581 Achel, Belgio; tel. (011) 643150.

Estrarano pri la delegita reto, rilatoj kun Esperanto-organizaĵoj kaj pri specialaj agadoj: D-ro P. Denoël, rue Victor Raskin 20, B-4000 Liège, Belgio; tel. (041) 270079.

Estrarano pri kongresoj kaj konferencoj: D-rino F. Szabó-Felső, Várady A. út. 4, H-7621 Pécs, Hungario; tel. (072) 16725.

Estrarano pri informado kaj turismo: S. Świstak, Poŝtfako 901, PL-30-960 Krakow 1, Pollando.

Estrarano pri financo: E.J. Woessink, Beethovenlaan 6, Doorwerth-6123, Nederlando; tel. (085) 33 56 31.



D-ro Pol Denoël

Pluralismo kaj unueco

EN SIA NOVJARA MESAĜO la prezidanto de UEA atentigis, ke ni verŝajne eniras decidan jardekon por la Internacia Lingvo. Pli ol iam antaŭe ni povus demandi nin: kiel triumfos Esperanto, kie en la esperantista komunumaro montriĝos unue plej certaj indicoj de la oficialigo? Neniu racia respondo estas nuntempe ebla, sed ĉiuj eblecoj ekzistas.

La multifaceta aspekto de la Movado, la diverseco de ĝiaj kontaktoj kun la ĝenerala publiko aŭ la oficialaj instancoj, liveras tiom da bonŝancoj por fine meti la fingron sur la ĝustan ŝaltilon. Pro tio ni devas ne bedaŭri, ke ankaŭ en la Esperanto-movado regas pluralismo de opinioj, de organizoj, de tendencoj.

En la historio de Esperanto, ne nur la malpacieneco de la adeptoj pro relativa malsukceso de la tradicia Movado, sed ankaŭ la neceso difini novajn batal-frontojn respondecis pri la splitiĝo de trupoj, kun la espero lukti sur pli ĝusta tereno. Kelkfoje ludis rolon katalizaj cirkonstancoj: loka oportunisto, individuista sinteno, timo antaŭ la malrapida moviĝo de peza, amasa Movado. Ĉu eble rolis ankaŭ ambicio de homoj? Ne gravas, se ĝi samtempe estas ambicio por Esperanto.

Interne de UEA mem regas ia pluralismo. Necesas de fakiĝo, deziro disponi pri pli da antenoj kaj kontaktpunktoj kun la ekstera mondo, rajtigas la kreon de diversaj fakaj asocioj, aliĝintaj aŭ kunlaborantaj. Pli neta estas la pluralismo en la sfero de la landaj asocioj. Inter 1948 kaj 1976, UEA duobligis la nombron de la aliĝintaj landaj asocioj. Ĉiu kontinento, ĉiu grupo de nacioj, ĉiu el la "tri" mondoj, estas reprezentita per la landaj asocioj en la moderna UEA. Tion postulas la universaleco de asocio, kiu proponas uzadon de komuna lingvo, ne al kelkaj elektitaj nacioj, sed al la loĝantoj de la tuta terglobo.

Tiu neevitebla diverseco de la landaj asocioj devigis UEA al konstanta singardo, por en ĉiu okazo konservi unuflanke pacan kunvivadon inter la landaj asocioj kaj aliflanke la asocian neŭtralecon, ambaŭ — nepraj kondiĉoj de kohero kaj efiko. Kelkfoje, tamen, la problemoj estas kompleksaj. En la intenco pli rapide oficialigi la Internacian Lingvon en sia lando, kaj tiel kontribui al la ĝenerala oficialigo, pluraj diverstendencaj landaj asocioj staras sur la ideologiaj pozicioj de sia nacio, ĉefe tie, kie tiu ideologio profunde enradikiĝis en la nacia vivo.

Tiu komplekseco ekzemple riveligis pli klare ĉe la ĵusa aliĝo de la Centra Laborrondo Esperanto (CLE),

la landa asocio de Germana Demokratia Respubliko. Pro ties leĝaro, CLE estas ligita ne nur ideologie sed ankaŭ strukture al la ne ŝtata sed tamen oficiala kultura organizaĵo de la lando. Temas do pri duobla ligiteco: al UEA kaj al enlanda instanco, do al du societoj, kies konceptoj, i.a. pri politika neŭtraleco, ne estas samaj. Post preno de la necesaj garantioj, UEA konsideris, ke tiu duobla ligiĝo ne estas obstaklo al aliĝo de esperantistaro, kies oficiala statuso en ĝia lando cetere aspektas kiel pozitiva faktoro. Ĉu tie ne kuŝas unu el la eblaj vojoj por atingi la ĝeneralan rekonon de la Internacia Lingvo?

Sed, la mikrokosmo de la homa mondkonceptaro, kun ĉiuj siaj aspektoj kaj kontrastoj — la Esperanto-movado, inkluzive de UEA — bezonas unuecon ne nur por eviti sterilajn konfliktojn, sed ankaŭ por celi al maksimuma efikeco. Por niaj interrilatoj ŝajnas ke kelkaj kondiĉoj estas necesaj.

Necesas unue celkonscia sinteno, t.e. sindevigo ne uzi rimedojn aŭ entrepreni klopodojn, kiuj malutilus la komunan celon. Ekzemple: kiam oni utiligas naci-lingvan gazeton por provi diskrediti kontraŭulojn, tio ĉiukaze malpliigas la bonŝancojn por la Internacia Lingvo.

Necesas ankaŭ, ke ni ĉiuj konsciu pri la relativeco de niaj fortoj vid-al-vid de la ankoraŭ grandparte indifera, konkerota mondo. Tio postulas kunlaboreman spiritostaton kaj evitadon de ĉia tento al troa apartismo aŭ centrifugismo. Eĉ se iuloke la sukceso al ni ridetas, ĉu ne ĉiam helpas la kontribuo de la aliaj, ĉu ne findecida estos la pezo de la tuta Movado? Kiel en la Ezopa fablo, ĉiuj organoj de la korpo bezonas unu la alian.

Necesas ĉefe toleremo de ĉiuj al ĉiuj. Ĉu cetere ĝi ne estis la plej karakteriza trajto de d-ro Zamenhof mem? Restas ja pluvalida la rajto defendi aŭ prezenti apartan vidpunkton. Agresemo estas evitinda en ĉiuj agoj, paroloj aŭ skriboj. Ni provu atingi, ke maniĥeismo forestu el niaj vicoj.

El la 90 jaroj de la vivo de Esperanto, krom la 10 dum la mondmilitoj, facile dekalkuleblaj, kiel perdita tempo, estas kelkaj pliaj jaroj de sterilaj polemikoj, marŝado en disa ordo, vana konkurenco, manko de komuna agadplano. Ĉu la historio kaj la strukturo de nia Movado, de UEA mem, ne instruas al ni, ke celkonscia kunirado, eĉ kun neevitebla konkuremo, estas la premiso de nia venko?

P. Denoël

Nova etapo en la evoluo de UEA

NE FINANCOJ — kiel tradicie — sed la funkciado kaj reorganizo de la Centra Oficejo de UEA estis la kerna temo en la Estrar-kunsido, kiu daŭris de la 7a ĝis la 9a de januaro 1977, dum 21 horoj, kun tagordo de pli ol 40 eroj. Esencajn demandojn pri reorganizo de la asocia sidejo jam traktis d-ro Tonkin en la artikolo aperinta en nia maja numero pasintjare (paĝoj 81-83). Post intertempe okazinta vasta diskuto pri tiuj ideoj, la Estraro nun faris plurajn decidojn, kiuj signas praktikan komencon de tiu reorganizo. Estas decidite en 1977 ekfunkciigi la novan fakon pri esploroj kaj planado. Ĝi parte respondas al taskoj, kiujn antaŭe plenumis CED, kaj parte al la multjara bezono plifortigi la informan aparaton de UEA. Tamen, plejparte la fako estas esence nova laborkampo kun centra pozicio en la Financa Programo de la Esperanto-Movado. La gvidanto de la nova fako respondecas pri tiuj sciencaj, statistikaj, buĝetaj k.s. esploroj kaj planado, kiuj ne apartenas al la rutina laboro de la CO. En tiu funkcio li ellaboras kaj kontroladas detalajn laborplanojn kaj buĝetojn por specifaj projektoj kaj bezonoj, precipe en la kadro de la Financa Programo, kaj mem proponas novajn projektojn kaj planojn. Li respondecas pri la efektivigo de la eldonplanoj de CED kaj de dokumentaj kaj informaj eldonaĵoj de UEA.

Direktoro pri esploroj kaj planado — tio estas la titolo de la gvidanto de la nova fako — fariĝas d-ro Victor Sadler (v. la foton kaj tekston en la kadro sur la apuda paĝo), la ĝisnuna direktoro de la CO de UEA. Li gvidis la Centran Oficejon tra malfacilaj problemoj kaj vastiĝanta agado kun granda talento kaj impona sagaco. Kiel sperta sciencisto kaj homo kun grandaj scioj pri Esperanto kaj la problemaro ĉirkaŭ ĝia disvastigo, d-ro Sadler estas perfekte kvalifikita por gvidi la novan fakon. La Estraro atingis la decidon pri la fondiĝo de tiu nova fako, cetere, ĉefe dank' al liaj efikaj laboro kaj kunlaboro kun la estraranoj kaj aliaj funkciuloj de la Asocio.

La nomigo de d-ro Sadler kreis neceson rekoncepti la postenon de la ĝenerala direktoro de la CO, kaj la Estraro nomis s-ron Mikulas Nevan (v. la foton kaj tekston en la kadro sur ĉi tiu paĝo) por plenumi tiun funkcion ekde la 1-a de marto 1977. La ĝenerala direktoro okupiĝos pri la interna funkciado de la CO, evoluigo de la agado de UEA, servoj al la membroj kaj ĝenerala administrado.

La enoficigoj de la direktoro pri esploroj kaj planado kaj la ĝenerala direktoro de la CO signifas novan etapon en la evoluo de UEA. Nia Asocio estas mirinde diversigita organizaĵo. Ĝi laboras sur multaj kampoj samtempe kaj en plej diversaj medioj. La sola maniero efike plenumi tian diversecon kaj plivastigi ĝin estas

pligrandigo de la ĝenerala skalo de niaj laboroj, precipe per komerca agado kaj evoluigo, en tiu kunteksto, de novaj servoj por la membraro. S-ro Nevan perfekte kombinas bonan scion pri la Esperanto-movado kun komerca sperto, tiel ebligante tiun necesan plivastigon de la skalo de la laboroj de UEA.

La Estraro diskutis ankaŭ la enoficigon de nova konstanta kongresa sekretario. Kvankam prezentigis pluraj kandidatoj, oni ankoraŭ ne faris definitivan decidon. Ankaŭ la demando pri eventuala translokiĝo de la CO al Belgio estis traktita — la Estraro eĉ ekskursis informcele al Antverpeno — sed oni ankoraŭ ne ŝajnas esti proksime al definitiva decido pri ĉi tiu afero.

Kaj la Asocio kaj la Kongreso profitis en 1976

Kvankam la finkalkuloj ankoraŭ ne estas definitive pretaj, la Estraro povis konstati, ke UEA finis la jaron



S-ro Mikulas Nevan, la nova ĝenerala direktoro de la Centra Oficejo de UEA estas 31-jara ĉefdevena nederlandano. S-ro Nevan studis ĉe la Alta Ekonomia Lernejo en Prago, estis profesia sekretario de la iama Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato, prezidanto de ties junulara sekcio, komitatano de TEJO kaj okupis aliajn funkciojn en la Movado. De 1969 ĝis 1973 s-ro Nevan plenumis la funkcion de konstanta kongresa sekretario en la CO de UEA kaj do konas multajn detalojn de ĝia funkciado. En la lastaj tri jaroj s-ro Nevan estis direktoro de grafika entrepreno, kiun li mem fondis.

1976 kun konsiderinda profito. Similaj estas la financaj rezultoj de la 61a UK en Ateno.

Laŭ propono de la Komisiono pri financo kaj administrado, la Estraro akceptis projekton de la buĝeto por 1978, kiu estos en la tagordo de la nova Komitato en Rejkjaviko. Post trijara stabileco, tiu projekto antaŭvidas altigon de la kotizoj — je verŝajne 10 procentoj. Kompense, la ekstereŭropaj membroj de UEA notos kun kontento, ke tiu buĝetprojekto antaŭvidas aŭtomatan aerpoŝtan sendadon de la revuo — do sen aldona pago — al ĉiu membro ekster Eŭropo. Oni kun aparta atento aŭdis informojn pri pliaj landaj asocioj, kiuj konsideras kolektivan abonon al ĉi tiu revuo, kaj decidis daŭrigi la pozitivan politikon ĉi-rilate.

Al tiu ĉi ĉapitro apartenas ankaŭ la informo, ke la Estraro kun speciala danko notis bonegan funkciadon de la Komisiono pri financo kaj administrado, kies laboro ebligis bonan superrigardon de la financa evoluo, kio siavice estas la bazo de la resanigita financa stato de UEA.

Aperos "Plena analiza gramatiko"

Sendube, al la plej gravaj decidoj faritaj dum ĉi tiu kunsido apartenas la akcepto de la propono fare de la komisiito pri eldona agado, d-ro U. Lins (kiu ĉeestis parton de la kunsido), ke UEA eldonu la reviziitan kaj kompletigitan verkon *Plena analiza gramatiko de Esperanto* de K. Kalocsay kaj G. Waringhien. Oni esperas, ke la verko — verŝajne pli ol 600-paĝa — aperos en 1978. Omaĝe al la forpasinta grandulo de la Esperanta literaturo, ĉe UEA baldaŭ aperos la neniam eldonita poemaro de Kalocsay, *Izolo*, kun antaŭparolo de W. Auld. Kiel eldonaĵo de CED en la daŭro de la kelkaj sekvantaj monatoj devus aperi *Esperanto kaj lingvistiko* de d-ro J.C. Wells.

Ankaŭ alia decido de la Estraro iel nerekte ligiĝas al la eldona aktiveco. Temas pri la Estrara raporto 1976/77, kiu ĉi-jare, kiel en 1976, aperos en nia revuo. Tamen, ĝi nun estos draste koncizigita kaj okupos proksimume nur duonon de nia junia numero, lasante tiel spacon al aliaj gravaj materialoj en la koncerna periodo.

Aliaj pli gravaj decidoj

Post raporto pri vizito de reprezentanto de la CO al Svislando kaj esploro de movadaj kaj aliaj cirkonstancoj tie, la Estraro definitivigis la decidon, ke la 64a UK okazu en la svisa urbo Lucerno en 1979. Pri aliaj decidoj kaj novaĵoj pri la ĉi-jara UK vi legos sur la paĝo 35. La Estraro notis kun bedaŭro la jam delonge esprimitan deziron de d-ro J.C. Wells retiriĝi kiel sekretario de la Internacia ekzameno, kaj nomis s-ran William Auld kiel novan sekretarion, kun komisiio okupiĝi pri plifortigo kaj renovigo de la Ekzameno. El la estraro de Institucio Hodler 68 baldaŭ retiriĝos pro okupiteco d-ro W. Bormann, kaj anstataŭ li estas nomita s-ro J. Verstraeten (Belgio).

Konforme al sia nova politiko — instigi diversajn landajn asociojn organizi beletrajn tradukajn konkursojn



D-ro Victor Sadler, kiu transprenas la novan funkcion de la direktoro pri esploroj kaj planado de UEA, estas 39-jara brito, vivanta jam 15 jarojn en Nederlando. Li venis al la CO en 1962, tuj post sia doktoriĝo pri fonetiko en Londono, kaj plenumis la funkciojn de redaktoro kaj ĉefredaktoro de *Esperanto* (1962-1974), redaktoro de *La monda lingvo-problemo* (1968-1974), direktoro de la CO (1968-1977) kaj dum la lastaj jaroj funkciis ankaŭ kiel aganta KKS. Li estas aŭtoro de pluraj studoj kaj en 1967 aperigis poemaron *Memkritiko*. D-ro Sadler estas membro de la Akademio.

en la kadro de siaj lingvogrupoj — la Estraro decidis, ke en 1977 UEA aŭspiciu tradukan konkurson, kiun oni kunlabore lanĉas en Britio kaj Usono, kaj la tradukan branĉon de la internacia konkurso "Larius" (v. apartan anoncon en nia januara numero).

S-ino Eliza Kehlet (Danlando) estas nomita kiel kunlaboranto de la Virina Komisiono pri la familia uzo de Esperanto. Temas ĉefe pri la kunordigo de la servoj por familioj kun denaskaj esperantistoj.

La Estraro aparte diskutis la proksimiĝantan centjaran jubileon de Esperanto en 1987 kaj komisiis al la nova direktoro pri esploroj kaj planado ellabori apartan perspektivan laborplanon por la jubilea jardeko.

KOREKTO

En nia numero de decembro 1976, en la teksto "Pli ol naŭ mil ekzempleroj", la komenco de la dua frazo devas teksti jene: Temas pri Germana Esperanto-Asocio (FR Germanio), kiu abonigas preskaŭ 1000 el siaj ĉ. 1700 membroj al la revuo de UEA,

La diferenco inter „ludi rolon” kaj „esti”

La grandformata ilustrita monata magazino „Soveta Unio” aperigis en sia 8a numero pasintjare (aŭgusto) ampleksan intervjuon kun la soveta lingvisto d-ro Mahomet Izmajloviĉ Isaev, konata ankaŭ en la internacia Esperanto-movado. Ĉar la 60-paĝa kolore ilustrita magazino aperas en 19 lingvoj (angla, araba, bengala, ĉina, finna, franca, germana, hindia, hispana, hungara, itala, japana, korea, mongola, rumana, rusa, serbokroata, urdua, vjetnama) kaj atingas plurmilionan eldonkvanton, ni verŝajne ne eraras asertante, ke la publikigo de tiu intervjuo estas unu el la plej bonaj informaj paŝoj faritaj en la ĝisnuna historio de la Esperanto-movado. Kvankam la respondoj de d-ro Isaev celas le neesperantistan legantaron — precipe en la alineoj, kiujn ni ĉi tie ellasis — multo en la intervjuo povas interesi ankaŭ niajn legantojn. Iom

Nia unua demando, Mahomet Izmajloviĉ, estas pri la malfacilaĵoj — ĉu vere ili estas tiom grandaj, kiel pri tio skribas legantoj?

Sur la tero ekzistas kelkmilo da lingvoj, kaj ĉiam pli da lingvoj ekhavas sian literaturon. Sur la scienciston en ĉiu fako de la scioj surfalas lavango da informoj — centoj da ĵurnaloj, milionoj da patentoj kaj libroj — kaj ĉio ĉi en lingvoj multnombraj, nealireblaj por unu homo. Tiun torenton ne povas venki eĉ la tradukservo. Aldonu al tio la astronomiajn sumojn, kiujn ĉe la ekzistanta situacio oni estas devigataj elspezi por tradukado ĉe miloj da internaciaj renkontiĝoj, kaj vi konsentos, ke la komuna helpa lingvo por solvo de tiu ĉi problemo estus grandega bono.

Sed ĉu tiun ĉi rolon ne ludas la lingvoj de la grandaj nacioj?

Estas diferenco inter „ludi rolon” kaj „esti”. Historiajn funkciojn de internacia rimedo por komunikado havis diversaj lingvoj — la greka, latina, araba, franca, angla. Sed ĉiuj ĉi lingvoj de kulturaj nacioj posedas egalajn esprimkapablojn kaj tial ili devas havi egalajn rajtojn. Se unu — kiu ajn — lingvo manifestas pretendojn esti internacia, tio igas la aliajn popolojn protesti, ja hegemonio de lingvo, tio estas hegemonio de kulturo. Ni, marksistoj, koncerne tiun demandon staras sur la klara, nedusenca pozicio de V. I. Lenin: „Eĉ ne unu privilegio por kiu ajn nacio, por kiu ajn lingvo.” Kaj se iu internacia organizo aŭ kongreso elektas unu el la lingvoj kiel laboran, tio okazas nur pro akra bezono.

avaraj estas la vortoj de d-ro Isaev pri la soveta Esperanto-movado. Tamen, la publikigo mem de la intervjuo — en la revuo eldonata de la ĵurnalo „Pravda”, organo de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Soveta Unio — estas klara signo, ke io grava okazas rilate la Esperanto-agadon en tiu vastega lando. En la koncizigita teksto de la intervjuo, kiun ni transprenas el „Bulgara esperantisto” 11/76, apartan atenton meritas denove avaraj vortoj de d-ro Isaev pri la pasintjare eldonita studlibro „Problemoj de la interlingvistiko”. Tiu 157-paĝa verko, kiun ni esperas baldaŭ recenzi, povas montriĝi epokfara, ĉar ĝi sendube estas la plej kompetenta ĝisnuna pritakso de pluraj facetoj de la Internacia Lingvo. Absurde, sed samtempe ankaŭ bonŝance, tiu grava verko ne estas ĝis nun havebla en Esperanto, sed nur en la rusa lingvo.

Definitive oni povas solvi la problemon nur pere de helpa internacia lingvo.

Kial multaj homoj opinias Esperanton bonega ideo, sed ve — ne akceptita de la vivo?

Planlingvo, t.e. tia, kies fundamentoj estas donitaj de sciencisto, povas ricevi civitanan rajton nur en la vivanta praktiko, firmiĝinte en la literaturo kaj la scienco. La historio konas nemalmultajn lingvistikajn homunkulojn: ido, occidental, interlingua, kiuj tute ne eliris el la laboratorioj, restinte ludilo en la manoj de amatoroj. Alia estas la sorto de Esperanto. Jam en 1905 okazis la unua kongreso de la adeptoj de tiu internacia lingvo, ekde tiam okazis 60 tiaj kongresoj (nur la internaciaj, kaj la naciaj estas multe pli). La homoj komencis paroli en tiu ĉi lingvo kaj tiamaniere inspiris vivon al ĝi — nuntempe en la mondo estas milionoj da esperantistoj. Nur la Universala Esperanto-Asocio, fondita en 1908, nombras en siaj vicoj pli ol 30 000 membrojn el 60* landoj, — kaj tio estas aktivuloj, homoj pretaj helpi al eksterlandaj turistoj en siaj landoj, homoj, kiuj propagandas kaj instruas Esperanton. En 1966, 72 milionoj da homoj — persone kaj pere de la reprezentantoj de siaj organizaĵoj, subskribis peticion al UN kun peto rekomendi la instruadon de tiu lingvo en la lernejoj.

Kaj kiamaniere oni nun lernas tiun ĉi lingvon?

La lingvon oni lernas precipe en klubaj rondoj aŭ en lernejoj, sed fakultative. En USSR kluboj kaj rondoj

* UEA tamen havas membrojn en pli ol 80 landoj.



D-ro M.I. Isaev: Trafaj vortoj por plurmilionaj legantaro.

de esperantistoj ekzistas preskaŭ en ĉiuj pli grandaj urboj. La tuta internacia agado de niaj esperantistoj estas kunordigata de speciala komisiono ĉe la Asocio de Sovetaj Societoj por Amikeco kun Eksterlando. Nome ĝi eldonas belartan kaj politikan literaturon en Esperanto.

La sovetaj esperantistoj partoprenas la movadon de la pacadeptoj. En 1954 estis fondita nova organizaĵo — MEM (Mondpaca Esperantista Movado). Ĝi havas sekciojn en 30 landoj, inter kiuj la nia, la soveta, estas konsiderata kiel unu el la plej aktivaj.

Kial Esperanto estas nomata helpa lingvo, ĉu ĝi ne pretendas pri la rolo de ĝenerala, universala?

Ne kaj ne. La fama soveta lingvisto prof. E. Bokarev ĉiam substrekis, ke la universala lingvo estas afero de

malproksima estonteco, kaj la helpa lingvo estas vivnecesa problemo nun.

Kaj kiel la verkistoj kaj sciencistoj taksas Esperanton?

Tiu ĉi lingvo havis kaj havas multajn adeptojn — inter ili Leo Tolstoj, Maksim Gorkij, Henri Barbusse, Romain Rolland, Lusin, Konstantin Ciolkovskij, Ivan Miĉurin, Vladimir Obruĉev k.a. Se temas pri lingvistoj, en la komenco de la 20a jarcento kreiĝis branĉo de la scienco, kiu studas la funkciadon de la internacia aŭ plana lingvo — interlingvistiko. Ekzistas internacia Akademio de Esperanto, kies membroj estas la elstaraj sovetaj sciencistoj P. Ariste, G. Sevak, V. Grigorjev.

Nedelonge la Prezidentaro de la Akademio de Sciencoj en USSR komisiis al la Instituto de Lingvoscienco "studi la demandon pri helpa lingvo por internacia komunikado, la eblojn pri ĝia uzado en la nuntempaj kondiĉoj". Estis kreita grupo pri la problemoj de la internacia helpa lingvo.

En la kuranta jaro verkoj de sovetaj sciencistoj aperis en la kolekto "Problemoj de la interlingvistiko". En la artikoloj, publikigitaj en ĝi, la sciencistoj venas al la konkludo: Esperanto estas la nura planlingvo, taŭga por internacia komunikado. Ili substrekas la neceson de pli vasta uzado de Esperanto por venki la lingvajn barierojn.

Kaj kian estontecon vi vidas por la lingvo Esperanto?

Esperanto ne estas celo, sed antaŭ ĉio rimedo por forigo de tiuj malfacilaĵoj, kiujn la multlingveco kaŭzas sur la vojo de la progreso. Se oni ne turnus sin al la helpa lingvo, tiuj malfacilaĵoj daŭre kreskos. Ja la nombro de la lingvoj, kiuj aperas sur la internacia areno, pligrandiĝas — al vivo vekigis novaj kaj novaj, en la pasinteco subpremitaj popoloj.

Intervjuis: A. Harkovskij

LINGVISTIKA KUNVENO EN NOV-JORKO:

Studioj pri Schwartz

EN LA KADRO de la 91a jara kongreso de Modern-Lingva Asocio (MLA) de Usono, inter la 26a kaj 29a de novembro 1976, en la hotelo New York Hilton en Nov-Jorko, jam la sesan fojon sinsekve okazis la seminario "Esperantaj lingvo kaj literaturo". Laŭ raporto de d-ro Richard E. Wood, la temo de la seminario estis "La populara literaturo en Esperanto, kun aparta atento al Raymond Schwartz". La aŭstralia ambasadoro ĉe UN, s-ro Ralph L. Harry, referis pri "La genio de Raymond Schwartz: La disvolviĝo de la ripetado kaj reduplikado en Esperanto", pri kio diskutis d-ro W. Solzbacher (konceptoj pri la lingva novigo en Esperanto), d-ro R.E. Wood (slavaj paraleloj al la reduplikado en Esperanto) kaj d-ro P. Ullman (problemoj ĉe la tradukado de Schwartz, kiu eluzas internan riĉon de Esperanto). Pro la foresto de d-ro Dennis Q. McNerny,

(li estis en eksterlando), oni laŭtleĝis lian referaĵon "La bono, malbono kaj aliaj aferoj: La morala vido en *Anni kaj Montmartre* de Raymond Schwartz". Pri la referaĵo diskutis d-ro J. Balbin (universaleco de la humuro de Schwartz).

Ankaŭ alia seminario de MLA, okazinta samtempe, tiu sub la nomo "Interlingvistiko", rilatis al Esperanto. En ĝia kadro d-ro Robert N. St. Clair referis pri "Universalaj elementoj, komunaj al ĉiuj lingvoj, aktuala temo en la nuna lingvistiko. D-ro St. Clair en simila seminario antaŭ du jaroj skeptike rilatis al Esperanto, sed nun tre bone posedas la lingvon kaj proponis, ke la sekvanta seminario (v. sur la paĝo 37) okazu parte en la Internacia Lingvo. Oni akceptis la proponon. D-ro Jul Balbin raportis pri sia enketo rilate la terminon "interlingvistiko" (v. la paĝon 37). D-ro Richard E. Wood traktis la temon "La komunumo de parolantoj de Esperanto en socilingvistika perspektivo". D-ro Jacob Ornstein parolis pri la temo "La senfina serĉo de mondlingvo — negativoj, pozitivaj, antaŭvidoj".

Nek lingvo nek pasporto por Eŭropo

Kun afabla permeso de la franca ĵurnalo "Le Monde", ni publikigas tradukon de ĉi tiu artikolo, aperinta en la numero de la 9a de decembro 1976 de la mondprestiga pariza gazeto. La aŭtoro Michael Hornsby ne diras multon novan al la legantoj de nia revuo (jes eble al tiuj de "Le Monde"), sed estas interese konstati ĝis kiu grado kelkaj argumentoj, uzitaj en ĉi tiu teksto, parencas aŭ identas kun tiuj, sur kiuj baziĝas la nuntempa laboro de la internacia Esperanto-movado.

LA NOVA EŬROPA KOMISIONO, kiu ekfunkcios sub la prezido de s-ro Roy Jenkins, la unua brito kiu akiros tiun postenon, en la komenco de la venonta jaro eklaboros, ekzamenante kiajn rezultojn kaŭzos la daŭra pligrandiĝo de la Komunumaro, kun la aliĝo de pliaj landoj. Necesos alfronti la problemon de la uzo de diversaj lingvoj, kiu ŝajnas supraĵa, sed kiu male estas altgrade politika kaj kies enhavo entenas multajn emociojn.

Nuntempe, la Eŭropa Komunumaro agnoskas ses lingvojn kiel oficialajn: la francan, la anglan, la germanan, la danan, la italan, la nederlandan. La belgoj ne havas propran nacian lingvon: la valonoj parolas la francan kaj la flandroj la nederlandan. La luksemburganoj utiligas la francan lingvon oficiale. Fine, la irlandanoj konsentis, kiam ili eniris la Komunumaron, uzi la anglan, sed la bazaj tekstoj estas tradukataj ankaŭ en la gaelan lingvon.


Nombro de eŭropaj funkciuloj konsideras, ke la uzo de ses diversaj lingvoj jam estas granda ŝarĝo por la Komunumaro. Ili opinias, ke, se oni devos dum la kvin venontaj jaroj aldoni la grekan, la portugalan kaj la hispanan kaj eble pli poste la turkan, la malfacilaĵoj tiam povus fariĝi ne tolereblaj, se ĉiu ŝtato-membro daŭre volas havi absolutan rajton utiligi sian lingvon ĉiumomente.

Ekde nun, kun la ses oficiale uzataj lingvoj, 38% de la dungitoj de la Komunumaro okupiĝas pri traduklaboroj. Pasintjare, okazis en Bruselo sep mil renkontiĝoj, kiuj postulis konstantan ĉeeston de interpretistoj kaj la tradukadon de ne malpli ol ducent sepdek mil paĝoj, en la ses oficialajn lingvojn.

Kial la komenciĝo de traktado por la eniro de Greklando en la Komunumaron ne estus okazo por raciigi la sistemon? La ideo de lingva disdivido — kiu estus avantaĝe realisma — estis proponita. Tiel, unuflanke la franca, angla, germana kaj itala estus laborlingvoj, kaj aliflanke, la nederlanda, la dana, la greka, ktp. figurus nur en la plej specialaj dokumentoj.

NATO* cetere, — kiu havas dekkvin membrojn — tre bone funkcias nur kun la franca kaj la angla kiel

S-ro Roy Jenkins, prezidanto de la nova Eŭropa Komisiono: Ĉu ankaŭ por li la lingva problemo en EEK restos "supraĵa" demando?



laborlingvoj. Kial do EEK havus pli ol kvar da ili? La danĝero de tia alfronto de la problemo — tiu de la sana prudento, kun ĝia tuta krueleco — estas, ke ĝi emas neglekti la politikan kaj emocian dimensiojn de la lingvo, en internacia organizo, kiu celas esti komunumo de nacioj kaj ne simple iu interregistara agentejo. La malfacilaĵoj kiujn la Komunumaro renkontas en siaj klopodoj realigi la ideon de eŭropa pasporto, reliefigas la delikatecon de la lingva problemo. Dum la ŝtatestra kunveno eŭropa en Romo, en decembro 1975, estis decidite, ke tiu pasporto pretu je la komenco de 1978. Sed depost tiam, la ŝtatoj-membroj ne ĉesis kvereladi pri la koloro, la ekstera aspekto kaj precipe pri la lingvoj kiujn ĝi devus enteni.

Babelturo

Ĉiuj membroj, escepte de unu, konsentus hodiaŭ, ke la pasporto estu redaktita trilingve: en tiu de la devena lando, en la franca kaj en la angla, ambaŭ plejparolataj lingvoj kaj interne kaj ekstere de EEK. La germanoj tamen, kontraŭas tiun solvon, timante ŝajne, ke ĝi fariĝus precedenco kaj sekve malgravigus ĝenerale la germanan lingvon, kompare kun la franca kaj angla. Sed, se oni aldonas la germanan al la franca kaj angla, tiam ne plu eblas rifuzi la italan, nek la aliajn lingvojn de la Komunumaro. Tiukaze, la pasporto fine fariĝus iuspeca felietona romano. Kverelo ĉi-speca ne malgravas. Ĝi tuŝas la koron mem de tio kio volas esti la Komunumaro kaj klarigas kial EEK neniam povos

* Nord-Atlantika Traktat-Organizaĵo

fariĝi Unuiĝintaj Ŝtatoj de Eŭropo laŭ la maniero de Usono.

Sur la alia bordo de Atlantiko, la unuaj enmigrintoj kunportis unu anglo-saksan lingvon kaj kulturon, kaj ĉiuj, kiuj sekvis ilin devis akcepti ĝin tia kia ĝi estis. EEK kunigas naciojn jam ekzistantajn, kiuj havas jarcentojn da tradicioj kaj treege malsimilajn kulturojn. Rifuzi al ŝtato-membro la rajton utiligi sian propran lingvon, aŭ konsideri ĝin "malpli valora" rilate al aliaj, signifas forapartigi ĝin al diaklasa kultura statuso.

La lingva sentemeco de Germanio kaj Italio klariĝas tiel. Iom aliaj kialoj kaŝas sin malantaŭ la ofendiĝemo de Francio pri tio. La francoj ankoraŭ alkroĉiĝas kun preskaŭ ŝovinista ardo al la eksa rolo de sia lingvo, la *lingua franca* en Eŭropo, rolo kiun ĝi devis poste pli kaj pli dividi kun la angla lingvo, pro la kultura kaj komerca influoj de Usono.

La entuziasmo, kiun montris la francoj favore al la akcepto de Portugalio kaj Hispanio en la Komunumaron, sendube ne estas fremda al la lingva problemo, ĉar tiuj du landoj estas gravaj lingvaj aliancanoj, taŭgaj por kompensi la angla-lingvan puŝon de 1973. La kultura politiko estis, iugrade, ĉiam same grava por la francoj kiel la komercaj konsideroj por la angloj.

Pro la delikateco de la punktoj — historiaj, politikaj, kulturaj kaj emociaj —, kiujn tuŝas la lingva demando, ne estas tre verŝajne, ke kelkaj raciig-projektoj pri ĉi tiu problemo fariĝos akcepteblaj por ĉiuj. Por la bono aŭ por la malbono, EEK ŝajnas tiel kondamnita resti babelturo, ĉar probable tio estas la sola maniero, ke ĝi pluvivu kiel komunumo de egalrajtaj membroj.

Michael Hornsby

Tradukis Marc Hiltbrand.

VOJAĜIMPRESOJ:

Kvar aziaj urboj

KOMPARE kun niaj antaŭaj raportoj pri la Esperanto-movado en Ĉinio, Japanio kaj Korea Respubliko (v. en *Esperanto* 1976, paĝoj 106-107, 184-187), la ĉi-foja raporto estas pri aziaj urboj kun manpleno da esperantistoj, kiuj izolite laboras por la sama celo.

Tajpeo

Ni havis 5 adresojn de esperantistoj en la insulo Tajvano kaj anticipe skribis al 2 kun peto, ke ni povu renkonti laŭeble multajn esperantistojn. El ili ni povis renkonti nur unu, nome la delegiton Johano B. Kao (pastro), dekanon de la Fakultato de Humanismaj Sciencoj en la Katolika Universitato Fu-jen.

Dum la 2-taga restado, ni renkontis ankaŭ 12 Esperanto-lernantojn kaj s-ron David K. Jordan el Usono, kiu faras etnologian esploron en Tajvano.

Malgraŭ ne-malofte okazantaj kursoj, laŭ nia sento, preskaŭ neniun kursano bone parolas kaj apenaŭ iu



Inaŭguro de nova Esperanto-kurso en la Katolika Universitato Fu-jen: Centoj aliĝas, malmultaj restas por finlerni.

restas en la Movado, verŝajne, interalie, pro manko de kontaktoj kun alilandanoj kaj pro ne tre modernaj instrumentadoj. Troviĝas ankaŭ en la Nacia Pedagogia Universitato deko da gestudentoj, kiuj lernas Esperanton, el kiuj ni renkontis 4.

Honkongo


Honkongo prezentas tute alian aspekton, ol Tajpeo. En grandaj librovendejoj, sub fako "Monda Lingvo", oni povas facile aĉeti esperantlingvajn librojn eldonitajn en Pekino, inkluzive de la gazeto *El Popola Ĉinio*, kion montris al ni tiea 26-jara esperantisto, Ŭajkit Li.

Estante brita kolonio, Honkongo havas du oficialajn lingvojn: la ĉinan kaj la anglan. 90 procentoj de la loĝantaro estas ĉinoj. El po 5 televidaj kaj radiaj programoj, po 3 estas ĉinlingvaj kaj po 2 anglalingvaj. Abundas krome japanaj kaj francaj vortoj en butikoj kaose.

Verŝajne ne estas facile esti firma esperantisto por homo loĝanta tie. Tamen, troviĝas entute deko da esperantistoj, el kiuj nur kelkaj estas novuloj. Sed ni ne povas ne esperi pri la ekzisto de pliaj dekoj da nekonataj esperantistoj, kiam ni konsideras la viciĝon de centoj da freŝaj eldonaĵoj en la fako "Monda Lingvo" en librovendejoj de Honkongo.

Bankoko

Antaŭ nia vizito al Bankoko, ni povis akiri nur 2 adresojn, al kiuj ni anoncis nian viziton. El ili ni povis renkonti nur s-ron Marcel Perray, kiu estas franca



S-ro M. Perray kun siaj 16-jaraj lernantoj en Bankoko.

pastro en katolika preĝejo. Estis iom malĝojige, ke ni trovis, en la urbo de 2,5 milionoj da loĝantoj, nur unu solan Esperanto-parolanton, kiu cetere ne estas tajlandano.

Tamen baldaŭ li bone forviŝis nian seniluziiĝon. Ni ĉeestis lian kurson, kiun sekvas kvar 16-jaraj knaboj. Cetere, el la pro varmego malfermita pordo, la kursejon eniris libere 3 knabinetoj, 5 – 10-jaraj, kun kiuj ni povis interŝanĝi kelkon da Esperantaj vortoj. S-ro Perray ĝemis pri manko de tajlingvaj lernolibroj kaj vortaroj, sed, loĝinte mem jam dum 20 jaroj tie, li nun komencis plani eldonon de tajlingva lernolibro. S-ro Perray nun havas entuziasman subtenon de eksparlamentano, kiun ni renkontis.

En Tajlando, kie oni uzas la tajajn alfabeton kaj ciferojn, la infanoj devas lerni la anglan lingvon ekde la unua jaro de la elementa lernejo. Malgraŭ tio, ni plur-

foje konstatis, dum nia 4-taga restado en Bankoko, ke la anglan lingvon povas paroli aŭ paroleti nur oficistoj de grandaj entreprenoj. Kontraste ni renkontis almenaŭ dekon da tajlandanoj, kiuj nun lernas la japanan lingvon.

Amano

Povinte havi nenian esperantistan adreson, ni tamen vizitis Amanon, la ĉefurbon de Jordanio. Jordanio, havante nur iom pli ol 2 milionojn da loĝantoj, ne suferas densan trafikon. Ni luis aŭtomobilon por pli bone vidi la sekan landon preskaŭ sen arboj, kie ni konsumis tage po 3 aŭ 4 litrojn da akvo, kaj veturis libere. Estante en montara regiono, ni demandis vojon al Morta Maro, kiel kutime en Esperanto. La demandito kriis nur: "Arabi! Arabi!".

E.J. Woessink kaj A. Woessink-Nagata

LA LINGVO EN LA PRAKTIKO:

Miĉiko kaj Mikiko

MEZE DE 1976, al Eŭropo venis membrino de la tokia grupo Rondo Hobio. F-ino Mikiko Mimori – tio estas ŝia nomo – tuj post sia partopreno en la UK en Ateno, ekvojaĝis tra Bulgarujo, Jugoslavio, Aŭstrujo, Francujo, Britujo, Nederlando, Danlando, Svedujo ktp. La vojaĝo ankoraŭ daŭras.

F-ino Mimori ne estas ordinara esperantista vojaĝanto. Ĉie kien ŝi venas, ŝi faras kursojn pri la arto de paperfaldado (*origami*, unu el la tradiciaj japanaj artoj), uzante Esperanton kiel interpretlingvon. Post sia reveno al Japanujo, ŝi fariĝos instruistino en elementa lernejo. Tial ŝi nun klopodas viziti multajn lernejojn. *Origami* estas tre taŭga por montri al lernantoj, kaj por ŝi mem la vojaĝo kaj la kursoj estas bonega okazo vidi kaj studi instrumanierojn en diversaj landoj.

F-ino Mimori ne estas la unua kiu faras ĉi tian vojaĝon. Antaŭ du jaroj, alia membrino de la Rondo, f-ino Miĉiko Hoŝi, entreprenis la unuan ĉi-specan vojaĝon tra Eŭropo: Jugoslavio, Bulgarujo, Hungarujo, ktp. Miĉiko, same kiel Mikiko, prelegis kaj gvidis multajn kursojn, sed pri alia temo – tinkturado. Esperantistoj de tiuj landoj maksimume uzis ŝian servon por la propagando de la lingvo. Ekzemple, per artikolo en ĵurnalo oni informiĝis, ke en iun lernejon venis japanino kaj instruis tradician japanan arton, ke ŝi demonstris la tinkturadon antaŭ publiko, ktp. Kaj, oni mencias, ke la komunika lingvo estis nur Esperanto. Tiu sukceso de Miĉiko kuraĝigis la Rondon plue sendadi membrojn al Eŭropo.

Sed, kio fine estas tiu tokia grupo? Rondo Hobio estas grupo de hobiistoj en diversaj kampoj, kiel la nomo mem diras. En la komenco nur duono de ĝiaj



Ĉie montriĝas granda intereso por la tradiciaj japanaj artoj.

membroj estis esperantistoj. Nun ĉiuj membroj konas la Internacian Lingvon.


En Japanujo, kiam neesperantistoj aŭdas pri Esperanto, ili ĉiam demandas nin, ĉu Esperanto estas utila, ĉu oni povas vojaĝi nur per Esperanto, ktp. Nome, ili volas scii, ĉu Esperanto estas praktike uzata en la mondo. Tiu demando estas tute natura por ili. Ni enfokusigis tiun temon kaj konkludis, ke ni provu pruvi ke Esperanto estas tiel utila kaj sciigu la interesitojn pri la vivanteco de la lingvo. Por tion atingi ni devas uzi Esperanton en ĉiutagaj aferoj. Ĉar lastatempe vojaĝo al okcidentaj landoj estas kvazaŭ modo en Japanujo, ni decidis kunigi tiun modon kaj Esperanton. Tiel fondiĝis Rondo Hobio, kun la celo vojaĝi tra la mondo helpe de ia (japana) hobia, per Esperanto. Do, membroj venis el ambaŭ flankoj, esperantista kaj hobiista.

Ni kontaktis kun multaj esperantistoj alilandaj kaj ili kun intereso akceptis ankoraŭ ne konatan grupon. Ni lasis al ili la demandon kiel uzi niajn servojn por propagando de Esperanto. Ili preparis kursojn en lernejoj, butikoj, publikajn kunvenojn ktp. Tie publi-

ko tre nature aŭdas Esperanton kaj spertas ĝian praktikan uzeblecon. Sed, kelkfoje okazis, ke la homoj pensas, ke ni parolas japane! Ankaŭ en Japanujo, ni ĉiam mencias kaj akiras konsenton pri la utiligo de Esperanto kiam ni petas helpon de komercaj instancoj, kiuj interesiĝas pri niaj eŭropaj vojaĝoj.

Ĉi-foje, dum la restado de Mikiko en Nederlando, s-ro Ruig (kiu estas nia fervora kunlaboranto en Nederlando) aperigis artikolon en la amsterdama ĵurnalo *Het Parool* (ĉ. 200 000 ekz.). Ĝi bone propagandis pri la demonstrado de la paperfaldada arto kaj multegaj homoj venis. Ankaŭ pere de tiu artikolo direktoro de muzeo ekinteresiĝis pri *origami* kaj petis nian helpon por okazigi ekspozicion pri la arto. Li konsentis, ke ni uzu nur Esperanton por korespondi kaj eĉ diris, ke en propagandaj afiŝoj Esperanto estos menciata. Estas fiksita, ke la ekspozicio okazos de junio ĝis oktobro 1977 en Edam, Nederlando.

Rondo Hobio daŭre sendos membrojn kun tradiciaj artoj al okcidentaj landoj. Jam du novaj kandidatoj



Infanoj ĉefe ludas, sed ludante ili ankaŭ lernas Esperanton.

anoncis sin por sekvi la antaŭulinojn. Kaj la interesiĝo tra Eŭropo montriĝas sufiĉe vastskala.

Krom la vojaĝoj, Rondo Hobio okupiĝas ankaŭ pri la instruado de Esperanto al infanoj. Per kartoĵoj, kantoj kaj dancoj, infanoj ludante lernas Esperantajn vortojn kaj frazetojn. Ĉiam venas pli ol 20 infanoj. Surbaze de tiu kaj aliaj spertoj, antaŭ kvar jaroj Rondo Hobio komencis gvidi infanan kongreseton, en la kadro de la Kongreso de Japanaj Esperantistoj, kaj ankoraŭ respondecas pri ĝi. Tio aldonas ĉarmon al la Kongreso. La enhavo de la kongreseto diferencas de jaro al jaro, sed ĉiufoje infanoj aŭdas pri la vivo de Zamenhof per diapozitivoj aŭ bildoj, kantas kaj ludas Esperante. Alie, ni ĉiam preparas programon ankaŭ por ne-esperantistoj, hazarde vizitantaj aŭ invitataj.

Aldone, Rondo Hobio nun studas eblecojn ellabori enkondukan libreton pri la japana lingvo en Esperanto. Tio ankoraŭ estas en la komenca fazo, sed estas nia revo, ke estontece tiu libreto respondu al la intereso de alilandanoj pri la japana lingvo.

Sonoko Kuzume

LA UNUA KOLOMBIA KONGRESO:

Vigle en Sud-Ameriko

LA UNUA Kolombia Kongreso de Esperanto okazis inter la 10a kaj 12a de decembro 1976 en Medellín, moderna metropolo kun 1,5 milionoj da loĝantoj. Proksimume 100 ĉefe junaj entuziasmaj partoprenantoj el 22 urboj de Kolombio ĉeestis. Ili vigle preparolis la estontan komunan organizon de la landa Esperantomovado, kiu ĝis nun konsistis el pli-malpli izolitaj grupoj. El eksterlando venis tri gastoj el Venezuelo kaj unu el Nederlando.

La estraranoj kaj membroj de la Antiokia Esperanto-Ligo en Medellín tre bone organizis la kongreson. Dank' al la rektoro de la fama Universitato Pontificia Bolivariana, la granda salono kaj kelkaj kunvenejoj estis senkoste haveblaj. La radio kaj ĉefaj gazetoj en la lando informis pri la kongreso. Ĉie en la urbo aperis belaj afiŝoj kaj bonkvalitaj faldfolioj en la hispana lingvo, pagitaj pere de anoncoj de 28 gravaj firmaoj.

Dum la inaŭguro, la prezidanto de la Kongreso, inĝ. Miguel Cano, bonvenigis la skabenon pri instruado, kiu salutis la kongreson nome de la urba magistrato. Prof. d-ro Manuel Angel Nuno bonvenigis la ĉeestantojn nome de la Antiokia Esperanto-Ligo. Por la Venezuela Asocio de Esperanto (VAE) parolis prof. J.E. Bachrich kaj por Nederlando kaj Eŭropa Esperanto-Centro s-ino J.H. Hoekstra-Sieders.

La postan tagon lokaj aktivuloj prezentis la laboron en siaj regionoj. Oni elektis komisionojn kaj redaktajn komitatojn. La prezidanto de VAE, prof. d-ro Augusto Ochoa, kiu dum 1974 estis en Eŭropo, prelegis pri lingvo- kaj Esperanto-instruado al etaj infanoj kaj la malĝustaj teorioj pri tiu temo. Prof. d-ro Manuel Angel pritraktis la rektan instrumentodon kaj siajn spertojn pri Esperanto-instruado en la Universitato Pontificia Bolivariana en Medellín. Tie ekzistas unua-, dua- kaj tria-grada kursoj, samrangaj kun alilingvaj kursoj. Prof. J.E. Bachrich donis interesan kontribuon per la temo "Kion, kiel, kiam kaj kiom instrui en elementa kurso?".

En la posttagmezo la kongresanoj estis dividitaj en laborgrupojn por interŝanĝi opiniojn kaj prezenti proponojn pri jenaj temoj: Historio de Esperanto en Kolombio; Enkonduko de Esperanto en la ĉiutagan vivon; Strukturo de la E-movado en Kolombio; Komunikado kaj informado. En la lasta tago de la Kongreso oni prezentis la konkludojn de la diskutoj en la laborgrupoj. Planoj antaŭvidas i.a.: subtenon de la laboro de UEA ĉe UN kaj Unesko, instigadon al kulturaj, instruaj kaj registaraj organizaĵoj por apogo al la instruado de Esperanto, plian integriĝon de la E-movado en Kolombio kaj Sud-Ameriko.

La Unua Kolombia Kongreso estis ĉiurilate sukceso. La duan kongreson oni planas venontjare en Bogoto.

J.H. Hoekstra-Sieders

Kvindek bovidoj por unu libro

ISLANDANOJ, laŭ tradicia diro, faris sian unuan skribaĵon dum la vintro 1117-18. (Somero estas sezono por eksterdoma laboro, vintro por endoma). Oni registris la leĝojn, kiujn oni ĝis tiam parkeris kaj deklamis ĉiujare en la parlamento. Tial oni kutime rigardas tiun jaron kiel komencon de la literatura agado en Islando. Malgraŭ tio, estas preskaŭ certe, ke tiu agado komenciĝis pli frue. Akceptante kristanismon kiel ŝtatan religion en la jaro 1000 (aŭ eble en 999), oni malfermis la pordon por la tiutempa internacia kulturo. Islandaj altranguloj komencis sendadi siajn filojn eksterlanden por studi, ekz. en Francujo, Germanujo kaj aliaj landoj. Tiuj filoj hejmenportis unuaklasajn sciojn kaj en Islando baldaŭ estiĝis lernejoj, kie oni instruis la sep mezepokajn artojn (gramatikon, dialektikon, retorikon, aritmetikon, geometrion, muzikon kaj astronomion). Entute oni povas diri, ke la 11a jarcento fariĝis unu el la kulture plej gravaj periodoj en Islando.


Pro diversaj kaŭzoj (eble ĉar tiom da personoj, ne sciantaj la latinan lingvon, lernis legi kaj skribi), oni tre baldaŭ komencis skribi en la nacia lingvo. Eblas almenaŭ supozi, ke la decido registri la buŝtradician leĝaron sur pergamenon povis okazi nur post ioma kvanto da jam skribita literaturo en la koncerna lingvo. Tial, antaŭ la literatura komenco dum la vintro 1117-18 certe okazis alia prakomenco.

Preskaŭ ĉiu mezepoka islanda manuskripto estas pergamena, la plej malnova papera manuskripto devenas el la jaro 1542.



La kaligrafia skribo estis tiutempe kutima, kun iom da specialaĵoj krom la specifaj islandaj literoj; vidiĝas ankaŭ iom da influo de la insulaj (t.e. britaj) literformoj. Inicialojn oni kutime ornamis, kelkfoje tre lerte, farante bildojn, foje verajn artaĵojn, kutime harmoniajn kun la teksto mem. Tiun pentroarton de miniaturoj oni tamen nemulte studis ĝis nun.

La skribintoj de la pergamenaj manuskriptoj kutime ne metis siajn nomojn en ilin, tiel ke oni hodiaŭ ne scias kiuj skribis, en la plej multaj kazoj ankaŭ ne kiuj verkis ilin. La skribojaro nur escepte estas menciita, kaj oni kutime devas difini la periodon laŭ nereakta metodo (komparo de lingvoformo, literformoj, helpe de mencioj pri konataj personoj aŭ okazaĵoj). Esceptaj estas kazoj,



kiel ekz. kamparano en la nordokcidentaj fjordoj, kiu en la 16a jarcento skribis: "Jena manuskripto estas mia 18a kopio de leĝaro".

Ĝis la 17a jarcento, preskaŭ nur islandanoj uzis la manuskriptojn, eble escepte de rakontoj pri norvegaj reĝoj, en manuskriptoj, kiujn oni siatempe uzis kiel pagilon en Norvegujo, ĝis la tiea nobelaro ĉesis kompreni la lingvon (en la dua duono de la 14a jarcento).

La mezepokaj islandanoj verkis librojn kaj en sia gepatra lingvo kaj en la latina; la latinlingvaj plejparte perdiĝis. La enhavo de la plej malnovaj libroj estas klerika, kvankam ekzistas inter ili ankaŭ komputistikaj (kalendara arto) kaj juraj libroj. En la fama *Unua gramatika traktato* (meze de la 12a jarcento) la anonima aŭtoro raportas pri leĝoj, genealogioj kaj religiaj klarigoj; oni scias ankaŭ pri tiutempaj astronomiaj verkoj.

En relative juna socio, kia la islanda tiutempe estis (plej multaj loĝantoj alvenis en la 9a kaj 10a jarcentoj), sen reĝo, estis socia kaj politika neceso scii pri sia propra gento aŭ familio, ĝiaj heroaĵoj, posedaĵoj ktp., por montri sian socian rangon. Tio povas esti unu el la motivoj por la estiĝo de la islandlingvaj sagaoj, sed certe estis ankaŭ aliaj kaŭzoj.

Manuskriptologiaj komparoj kaj aliaj studoj montras, ke oni devas kalkuli pri aro da perditaj manuskriptoj; kelkaj el ili estas eĉ rekte menciitaj en la ekzistantaj manuskriptoj. Dum la 12a jarcento la nombro de pergamenaj libroj kreskegis, sed la plej multaj konservitaj devenas el la periodo inter la jaroj ĉ. 1300 – ĉ. 1450. Riĉuloj kaj aliaj gravuloj (juĝistoj, episkopoj, ĉefaj bienuloj ktp.) mendis por si la skribadon de grandaj libroj, kun rakontoj el la pasintaj periodoj (por amuzo kaj pro sia socia rango) kaj leĝaroj (por praktika uzo).

Multaj el tiuj libroj estas en granda formato; en kelkaj el ili por ĉiuj du pergamenaj folioj oni bezonas tutan senharigitan bovidan felon. Por havigi materialon por granda libro, ni diru 200-paĝa, oni do kutime devis buĉi 50 bovidojn. Post la jaro 1550 komenciĝis la periodo de la paperaj manuskriptoj en Islando, kvankam oni uzis pergamenon por juraj dokumentoj ankaŭ ĝis post la jaro 1600.

Manuskriptajn tekstojn oni laŭbezone kopiis, kaj malnovajn manuskriptojn, apenaŭ plu legeblajn, oni malalte taksis ĝis la lastaj jarcentoj. Tiel la malnovaj manuskriptoj fariĝis perdiĝemaj.



Estas malfacile diri kiom da islandaj manuskriptoj konserviĝis. Oni mencias la nombron de iom pli ol 700 mezepokaj pergamenajoj, sed estas malfacile diri, kio estas unu, kaj kio alia manuskripto. Multaj volumoj nome konsistas el originale diversaj volumetoj, kiujn oni iam unuigis, kaj, aliflanke, iuj originale unuecaj manuskriptoj disiĝis kaj hodiaŭ iliaj partoj troviĝas eĉ en malsamaj bibliotekoj.

Kompare kun la pompe blankaj manuskriptoj, trov-eblaj en alilandaj bibliotekoj aŭ muzeoj, ekz. en la Brita Muzeo, pergamenajoj plenaj de oraj pentrobildoj, unuaklase konservitaj je favoraj kondiĉoj, la islandaj manuskriptoj povas ŝajni malhelaj, malbelaj, eĉ malpuraj. Pri sia enhavo ili tamen ne bezonas honti, kaj la vulgara aspekto montras, ke ne temas pri nura ornamaĵo por riĉuloj, sed pri uzitaĵo, literaturo legita de multaj generacioj, en primitivaj teraj domoj, helpe de la malpuriga fiŝolea lampo. Iu knabo aldonis en pergameno: Mi estis 11-jara; estis malfacile legi tiun libron.

Jam antaŭ la jaro 1700 oni en Kopenhago (tiam ĉefurbo de la dana ŝtato, inkl. de Islando) kaj Svedujo komencis kolekti islandajn manuskriptojn. La plej fama kolektanto kaj ĝis hodiaŭ la plej konata manuskriptologo islanda estis Árni Magnússon (1663-1730). Li heredigis al la Universitato de Kopenhago sian manuskriptan kolekton, kaj tial la dana ĉefurbo estis la ĉefa centro por studi kaj eldoni islandajn manuskriptojn ĝis en la lastaj jaroj.

En la jaro 1962 oni faris en Danujo nekutiman decidon — senpage dividi la tiean kolekton de la manuskriptoj, ekz. en la instituto nomita laŭ Árni Magnússon (Det Arnamagnæanske Institut), kaj resendi la islandan parton al ĝia origina lando. Tiu decido, redoni tiel multajn muzeaĵojn al ilia origina hejmo, estas unika

en la mondo, laŭ mia scio, kaj kredeble — ankoraŭ — ne povus okazi inter aliaj popoloj ol la skandinavaj.

En Rejkjaviko oni fondis specialan instituton, sendependan de tiu en Kopenhago, por studi kaj eldoni la manuskriptojn. Ĝi ekfunkciis kiel memstara universitata institucio (Stofnun Árna Magnússonar á Íslandi) en 1962. La instituto situas en la sama domo, kie verŝajne estos la akceptejo por la 62a UK — cetere inda simbolo pri interpopola kunlaboremo. La unuaj islandaj manuskriptoj — simbole, du el la plej konataj (*Codex Flateyensis*, volumo kun kolekto de sagaoj, kaj *Codex Regius* de la poemoj el Edda, ambaŭ el la Reĝa Dana Kolekto, GKS) — tiel revenis al Islando la 21an de aprilo 1971.

Iom post iom Rejkjaviko fariĝas centro por la islandaj manuskriptoj. Oni ja devas diri, ke la ĉefaj specialistoj pri la manuskriptoj, ankaŭ dum ilia restado en Kopenhago, plejparte estis islandanoj, el kiuj eble la poeto prof. Jón Helgason (nask. 1899) estas la plej bone konata.

Entute, oni dum la lastaj jardekoj aperigis aron da fotokopiaj eldonoj de la manuskriptoj; laŭliterajn eldonojn oni havas depost la fino de la lasta jarcento, kaj normaligitajn tekstojn oni havis jam dum du-tri jarcentoj. Normaligitajn tekstojn ĉiu islandano povas legi, kaj specimenojn de la literaturo oni legas en mezaj, partojn eĉ en la elementaj lernejoj. La lingvoformo en la manuskriptoj tiom similas al la hodiaŭa islanda, ke lerninte la manskriban alfabeton hodiaŭaj islandanoj facile povas ilin legi.

Kiel legi la manuskriptojn?

ĈI TIU PAĜO de pergameno (v. la foton) el la jaro 1363 povas servi kiel specimeno pri la skribo kaj ornamaĵoj de la islandaj manuskriptoj. La unua linio de la maldekstra pergamena kolumno estas titolo de la ĉapitro. En la komenco, la granda ĉeflitero kun vizaĝbildo — inicialo — signas komenciĝon de la ĉapitro.



Tie ĉi, la inicialo estas la speciala islanda litero **p** (prenita el la anglo-saksa), signanta malsonoran postdentalan spiranton, kiel la angla **th**. (Skribmaŝine oni povas imiti ĝin per **b** kaj **p** tajpitaj samloken). La alia "nekonata" litero en la teksto **ð** signas la sonoran varianton de la sama sono. (Ĝin oni povas anstataŭigi per supre trastrokita **d** — **đ**). Oni povas deĉifri la tekston de la dua linio ĝis la punkto en la kvina linio jene (interkrampe estas la superliniaj literoj):

Pat ero almen(n)ing(ar) er at fornu h(afa) u(er)it. Sætr ma hu(er)r m(aðr) gora er þ(an)n almen(n)ing áá. ef h(ann) uill þar sitia isumar setri.

Skribita moderne, per normaligita ortografio (tamen sen ŝanĝi la vortformojn mem), tiu teksto aspektus jene:

Pat eru almenningar er at fornu hafa verit. Setr má hvern maðr gora er þann almenning á, ef hann vill þar sitja í sumarsetri.

En la hodiaŭa islanda lingvo la teksto jenus:

Það eru almenningar er að fornu hafa verið. Setur má hver maður gera er þann almenning á, ef hann vill þar sitja í sumarsetri.

Vortlisto:

Pat - tio, ĝi	maðr - homo
eru - estas (pl.)	gora - fari
almenningar -	er - kiu
komune posedata	þann - tiun
lando (pl.)	almenning
er - kiuj	-komunan landon
at fornu - en	á - posedas (sg.)
malnovaj tempoj	ef - se
hafa verit - estas	hann - li
(pl.) estintaj	vill - volas
setr -	þar - tie
somerpaštejon	sitja - sidi, resti
má - rajtas (sg.)	í - en (kun dat.)
hverr - ĉiu	sumarsetri
	- somerpaštejo

Traduko:

Estas komuna tero, kio tiel malnovtempe estis. Somerpaštejon ĉiu rajtas fari, kiu posedas parton en tiu komuna tero, se li tie volas resti dumsomere.

Árni Böðvarsson

Recenzoj

Ĝi ne estas romano

Recenzas Vilmos Benczik (Hungario):


Akvariinfanoj, La, de W.A. Verloren van Themaat. Lelystad (NL): Vulpo-libroj, 1976. 64p. Ilus. 20cm. ISBN 90 70074 06 0.

Antaŭ ĉio estas necese konstati, ke la verko de Verloren van Themaat estas nek sciencfikciaĵo, nek romano, sed pamfleto utiliganta iujn beletrajn rekvizitojn. Ĝi estas direktita kontraŭ la mortiga abortigo de la homa embrio.

La ĉefrolanto de la verko estas David Kurio, kuracisto-embriologo kun firma volo kaj ne malpli firma kristana

etiko, kiu ellaboras metodon vivteni kaj plueduki en specialaj akvarioj eĉ nur kelksemajnaj abortitajn fetojn. La socio akceptas favore la novan manieron kreskigi la loĝantaron — kiu ĉie malkreskas en la lasta kvarono de la 20a jarcento — sed post kelka tempo jam montriĝas "troproduktado" de infanoj. Oni enkondukas leĝon, kiu limigas la vivtenajn abortojn, kaj denove permesas aborti mortige. David Kurio, malvenkinte en la batalo por sia ideo, mortas.

Mi ne volas tuŝi ĉi tie la etikan-sociologian flankon de la temo, nome, ĉu la socio vere devas vivteni ĉiun feton vivteneblan. Pri tio ĉiu havas sian opinion depende de ideologia sinteno. Sed la literaturaj kvalitoj de la verko — sendepende de ia ajn ideologio — estas tre modestaj. La historitekso estas naŭva kaj pala, la personaĵoj estas sterilaj kaj samtempe banalaj. La stilon karakterizas ĵurnalisma supraĵeco, nefajlitate. Ĝenas ankaŭ kelkaj neologismoj, kies uzon pravigas nenio (ekz. *soliciti*, *klandestina*). Do, ne por literaturamantoj, sed por personoj, kiujn interesas la temo mem. **Prezo:** 9,60 (por Nederlando 9,98) gld., plus sendokostoj 10%.



Vigla hejma lingvaĵo

Recenzas Wouter F. Pilger (Nederlando):

Ĉu vi kuiras ĉine?, de Johán Valano. Aabyhøj: Dansk Esperanto-Forlag, 1976. 134p. 20cm. ISBN 87 85020 885.

"Originale verkita en Esperanto". Jen la indiko kiu ornamas ankaŭ ĉi tiun titolpaĝon. Sed ĉi tie ĝi havas alian signifon: Se ie ekzistas lando Esperantujo, kie vivas normalaj homoj kies lingvo estas Esperanto (do ne kongresanoj aŭ vizitantoj de klubaj vesperoj), en tiu Esperantujo okazas ĉi tiu rakonto. La loka lingvo povas esti neniuj alia ol Esperanto. La "dialektoj" estas pure Esperantaj. Malofta sperto, ĉar la roluloj certe ne estas esperantistoj laŭ la kutima signifo de la vorto.

Tro ofte mi, kies familia lingvo ĉiutaga estas Esperanto, legante verkon laŭdire "originale verkita en E-o", devas daŭre salti al pluraj vortaroj ĉar ia aŭtoro pruntis sian esprimkapablon ĉe studĉambraj vortaristoj. Sed ĉi tiu aŭtoro, kiu tamen plene utiligas la eblecojn de la lingvo, klare montras ke por li la lingvo estas plejpropra, normala, ĉiutaga komunikilo. Li ne bezonas hejmbakitajn vortaristajn eltrovaĵojn por skribi per vigla, "esprimiva" stilo.

Mi ankoraŭ nenion diris pri la rakonto mem. Detektiva rakonto kun sufiĉe da psikologio, kaj kaptanta la

atenton ĝis la fino. Iu bela knabo, politike kaj ame aktiva, neatendite mortis kaj la polico devas eltrovi kiel kaj kial. Pli recenzisto ne diru por ne fuŝi la plezuron de la legado.

Prezo: 12,30 (por Nederlando 12,79) gld. plus sendokostoj 10%.

Inteligente verkita

Recenzas W.A. Verloren van Themaat (Nederlando):

Esperanto o Interlingua, de Ric Berger. Morges (Svisl.): Editions Interlingua, 1972. 150p. 12 svisaj frankoj.

Per ĉi tiu libro la aŭtoro, unu el la plej kompetentaj adeptoj de la planlingvo Interlingua, klopodas pruvi ĝian superecon rilate al Esperanto. Li opinias, ke la publiko malakceptas Esperanton pro ĝiaj lingvistikaj mankoj kaj tial estas bezonata lingvistike pli bona planlingvo. Sed la publiko malakceptas la principon de planlingvo, ne ĝiajn lingvistikajn detalojn. Multajn detalojn de Esperanto li kritikas, parte prave. Lia kompara radikaro de Esperanto kaj Interlingua, por pruvi la pli grandan internaciecon de la radikoj de Interlingua, estas iom tendence elektita. Zamenhof ne neglektis la internaciecon de la radikoj, nur juĝis ĝin laŭ aliaj kriterioj ol IALA, atentante ne nur la latinid-

ajn lingvojn. Ĉar la ĝermanaj lingvoj, inkluzive la anglan, havas pli da parolantoj ol la latinidaj, por multaj nocioj, por kiuj la angla lingvo havas ĝermanan vorton, la ĝermana vorto estas konata al pli multaj homoj kaj do pli internacia ol la latinida.

Kiel scias ĉiuj kiuj okupiĝas pri interlingvistiko, la plej granda diferenco inter la planlingvoj estas en la derivsistemo. La ĉefa tezo de Berger estas, ke la derivsistemo de Interlingua estas en la praktiko ne nur pli natura, sed ankaŭ pli regula ol tiu de Esperanto, ĉar Interlingua povas generi larĝajn familiojn de internaciaj vortoj per sia propra derivsistemo, dum Esperanto devas adopti multajn el ili kiel apartajn radikojn. Lia ĉefa eraro estas, ke li konsideras nur derivaĵojn de la sama vorto, ne vicojn de radikoj kaj derivaĵoj kun la sama semantika rilato. Interlingua ofte uzas 3 aŭ 4 afiksojn por la sama signifo, tiel ke en ĉiu kazo oni devas scii aparte, kiun afikson oni uzu por formi certan derivaĵon. Por detaloj vidu *Planlingvaj problemoj* de Gilbert.

Ke la esperantistoj restas fidelaj al Esperanto malgraŭ ĝiaj lingvistikaj mankoj, Berger povas atribui nur al tio, ke por ili Esperanto estas religio. Esperanto ne estas religio, sed socia-kultura fenomeno. Ekz. la literaturo en Interlingua, kvankam ne tute mankanta, ĝis nun povis nur revii pri la nivelo de la kulminuloj en la Esperanta literaturo.

Malgraŭ tiuj rimarkoj libro inteligente verkita kaj rekomendinda por ĉiu kiu volas ekkoni la vidpunkton de alia planlingvano pri nia lingvo.

Laste aperis...

Aventuroj de Simplicius Simplicissimus, La (1669), H.J.C. von Grimmelshausen (ĉ. 1625-1676). El la germana trad. M. Hektor, H. Heiss kaj F. W. Poppeck. Oberkirch/Nürnberg: L. Pickel, 1976. 21p. 21cm. Kelkaj specimenaj ĉapitroj el la ĉefverko de la germana literaturo. **Prezo:** 3,90 gld.

Ĉu armeo aŭ civila, neperforta defendo? (1975), Div. aŭtoroj. Laroque Timbaut: La Juna Penso, 1977. 84p. Mimeo. 21cm. Traduko de franca pacista broŝuro. **Prezo:** 3,30 gld.

Dum la noktoj kaj aliaj kantoj, W. Auld, M. kaj D. Hill. Londono: Brita Esperanto-Asocio, 1976. 70p. Ilus. 21cm. 22 originalaj kantoj kun muziknotoj. **Prezo:** 5,10 gld.

... El la kara infaneco, Valo (pseŭdonimo). Laroque Timbaut: La Juna Penso, 1977. 99p. Mimeo. 21cm. Memorajoj de la aŭtoro de 1900 ĝis 1914. **Prezo:** 3,90 gld.

Elementa zoogeografio, C. Støp-Bowitz. Lieĝo: Someraj Universitataj Kursoj, 1976. 81p. Ilus. 29cm. Ofsetita manuskripto. **Prezo:** 16,80 gld.

Enkonduko al finiaj geometrioj, William F. Orr. Lieĝo: Someraj Universitataj Kursoj, 1976. 25p. Ilus. 29cm. **Prezo:** 6,00 gld.

Forto de la fortaj, La, J. London. El la angla tradukis K. Fröding (1914). Laroque Timbaut: La Juna Penso, 1977 (2a eld.). 28p. Mimeo. 21cm. Krom la titola rakonto, enestas ankaŭ du klarigaj artikoloj. **Prezo:** 1,50 gld.

Individuismo en antikveco, Han Ryner. El la franca trad. Valo. Laroque Timbaut: La Juna Penso, 1977. 53p. Mimeo. 21cm. Kritika historio de individuismo en la antikvaj tempoj. **Prezo:** 2,70 gld.

Kolekto de materialoj pri la Esperanto-movado en Koreio, vol.1. Kompilis Hisato Nakada. Jokohama: Jokohama Esperanto-Rondo, 1976. 65p. 25cm. **Prezo:** 11,10 gld.

Klerigo kaj prikalkulado, Diversaj aŭtoroj. Redaktis H. Behrmann kaj S. Štimec. Bamberg: Verlag Difo-Druck, 1976. 135p. 20cm. Prelegoj el la unua sesio de Someraj Internaciaj Universitataj Semajnoj de Eŭropa Klubo. Kontribuoj (H. Frank, O. Reiersøl, k.a.) pri kibernetiko, informadiko, scienca terminologio. Germanlingvaj resumo. **Prezo:** 8,40 gld.

Lingvo kaj logiko, A. Goodheir. Glasgow: Kardo, 1977. 20p. 18cm. **Prezo:** 1,50 gld.

Originoj de la vivo de biokemiaj vidpunktoj, S. Kawamura. Lieĝo: Someraj Universitataj Kursoj, 1976. 62p. Ilus. 29cm. Ofsetita manuskripto. **Prezo:** 13,80 gld.

Paco kaj sekureco por la popoloj, T. Jivkov. Sofia: Sofia-Press, 1975. 7p. 17cm. **Prezo:** 0,90 gld.

Transe, Lorjak (pseŭdonimo). Helsinki: Fondumo Esperanto, 1976. 153p. 17cm. ISBN 951-9005-38-2. Originala romano el la plumo de la aŭtoro de "Neologisme". **Prezo:** 22,20 gld.

Ventoj (1969), Blagoja Ivanov. El la makedona trad. J. Velebit. Zagreb: Internacia Kultura Servo, 1976. 105p. 20cm. Psikologia romano pri fremdiĝo de la homo en la moderna socio. **Prezo:** 9,00 gld.

Vorto-mozaiko. Tokio: Tokia Esperanto-Kooperativo, 1976 (2a eldono). 151 kartoj en plasta skatolo, kun instrukci-libreto. Modernkoncepta ludkartaro, kiu ebligas multajn diversajn ludojn. Por komencantoj kaj progresintoj. **Prezo:** 6,90 gld.

LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando, ne akceptas mendojn, kiuj ne atingas la minimuman mendosumon de 15,— guldenoj. Al la netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 4% kaj al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 18% por la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por la sendokostoj. Tamen, la sumo de la sendokostoj estas minimume 3,— gld.


La pleja IS

LA 20a INTERNACIA Seminario (IS) de Germana Esperanto-Junularo (GEJ), inter la 27a de decembro 1976 kaj la 3a de januaro 1977: "... fruktodonan laboron... plenan sukceson... kaj deziras al vi agrablan restadon en Zenzenŝtajn!" La publiko ĝojis ĉar ankaŭ la dommastro jam progresis ĝis la tria leciono en Esperanto-lernolibro, kaj oni aplaŭdis entuziasme. Tio estis salutvortoj dum la interkona vespero, deviga elemento de ĉiu renkontiĝo. Sed la sceno dum la unua programero de la 20a IS de GEJ rapide ŝanĝiĝis. La homoj babilis, intervjuis sin reciproke, kuradis, kaj la oficialuma atmosfero baldaŭ dronis en ĝenerala ĥaoso. La rezulto pendis dum semajno sur tolaĵoŝnuro: cento da persekut-, aŭ kiel ni nomis ilin, intervju-afiŝoj kun fotoj kaj personaĵoj de ĉiu ĉeestanto.

Cento da partoprenintoj (132 aliĝoj) — dum la silvestro eĉ pli — tio signifis unu el la plej grandaj aranĝoj en la riĉa seminaria historio. Ne mirige, ĉar la aranĝo estis anoncita kiel speciala, jubilea, novstila, eksterkadra kaj eble, konsiderante la opiniojn ĉe la fino, ĝi iom pravigis tiun reklamon.

"Demandoj pri eŭropa unuiĝo" estis la temo de la Seminario, en esperantistaj rondoj ne tre freŝa, sed aktuala. Do, ne estis malfacile trovi kvalifikitajn prelegantojn kaj gvidantojn de laborgrupoj. Finfine estis dekduo da ili, aldoniĝis du surloke kaj ĉiuj komune supersutis la aŭskultemulojn per dek kvin diversaj laborprogramoj. La pretendoj de la eŭropkomunumaj instancoj kontraste al la praktiko estis ekz. raportobjekto de vera spertulo: Brian Moon, tradukisto en Luksemburgo, povis rakonti el sia ĉiutaga vivo. La historian flankon prilumis italino Perla Martinelli, kiu parolis pri la ideoj de sia pasintjarcenta samlandano Giuseppe Mazzini. Aldoniĝis kristanismo en Eŭropo, Esperanto en Eŭropo, minoritatoj en Eŭropo kaj deko da aliaj aferoj. Sed ne nur por la spirita, ankaŭ por la korpa bono zorgis la laborprogramaro. Ekzemple: Seminaria kvarono kursis pri francaj kuirspecialaĵoj, mem produktante siajn tagmanĝojn. La lastan tagon de 1976, ĉiu povis partopreni en iliaj ĝuoj: nemiskomprenebla odoro persiste propagandis francan fiŝsupon.

Veteranoj ĝis metuzalemoj de la Movado trovis sian programeron en "GEJ en retrospektivo". Oni rakontis kun brilaj okuloj kaj feliĉaj vizaĝoj el la 25-jara historio de GEJ, pri fruaj bataloj, renkontiĝoj, subvencioj. La kulmino de la vespero estis serio de diapozitivoj, sur ili multaj malgrasaj, pintvizaĝaj, verve diskutantaj personoj, iamaj gejunuloj, la nuna mezaĝa generacio de la Movado.



Franz Kruse estas la nova prezidanto de GEJ.

Resumo post la aranĝo estus utila: Kunsidis la Estraro de TEJO; GEJ jarĉefkunvenis kaj elektis novan estraron; multaj scias iom pli pri la eŭropa sceno; atentaj televid- kaj gazet-konsumantoj scias iom pli pri Esperanto; aliaj lernis iom de ĝi; la ceteraj almenaŭ pasigis amuzan feriosemajnon.

Guido Brandenburg

UNESKO SERĈAS JUNAJN VOLONTULOJN:

Duonjaro en Parizo?

S-ro P. VAGLIANI, aganta direktoro de la Junulara Fakto de Unesko, lastatempe informis nin, ke lia fakto prizorgas programon laŭ kiu oni varbas universitatajn k.s. studentojn por labori kiel volontuloj en la Sekretariato de Unesko dum periodo de tri ĝis ses monatoj. Tiu programo donas al aktivuloj sur la junulara kampo eblecon senpere konatiĝi kun la labormetodoj kaj celoj de la internacia organizo, kaj Unesko mem povus profiti el novaj ideoj de tiaj gejunuloj.

Oni antaŭvidas, ke ekde la komenco de 1977 estos bezonataj la servoj de almenaŭ unu volontulo, kiu bone konas la laboron de internaciaj junularaj kaj studentaj neregistaraj organizoj. Normale oni donos al volontuloj ekvivalenton de 500 usonaj dolaroj monate por pagi loĝadon, manĝojn, poŝmonon ktp. La vojaĝkostojn al Parizo kaj reen Unesko ne kovros. La unua periodo de laboro daŭros tri monatojn, sed ĝi estos plilongigebla, depende de la laborkvalito de la volontulo. La kontrakto normale finiĝos post ses monatoj.

Eventualaj kandidatoj bonvolu komuniki sian intereson al d-ro Victor Sadler, ĉe la Centra Oficejo de UEA, sendante ankaŭ detalojn pri kvalifikoj kaj indikante la daton je kiu ili fariĝos disponeblaj. UEA interkonsiliĝos kun TEJO kaj, depende de la taŭgeco de la kandidato, plusendos la informojn al Unesko.

H.T.

62a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO, Rejkjaviko (Islando) 1977 07 30 – 08 06

Alta Protektanto: d-ro Kristján Eldjárn, prezidanto de la Respubliko Islando.

Konstanta adreso: Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando.

Adreso de la LKK: Pósthólf 1081, Reykjavík.

Protektanto ĉeestos persone

La Alta Protektanto de la Kongreso, la islanda ŝtat-prezidanto d-ro Kristján Eldjárn, afable konsentis persone ĉeesti la Solenan Inaŭguron. Li krome akceptos reprezentantojn de la Kongreso en la Prezidanta Rezidejo.

La rajto je komunikado

En sia januara kunsido en Rotterdam la Estraro de UEA fiksas kiel ĉeftemon de la Kongreso en Rejkjaviko: "La rajto je komunikado". Estas planate inviti al la ĉefa laborsesio ankaŭ specialistojn pri tiu temo el ekster la Esperanto-movado. Kvankam la vorto "komunikado" ne aperas en la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, pluraj fundamentaj rajtoj apartenas sub tiu rubriko – ekzemple la rajto je privateco de la korespondado, la rajto manifesti sian religion aŭ kredon, la rajto je libera esprimado kaj la rajto peti, ricevi kaj havigi informojn kaj ideojn per kiu ajn rimedo kaj senkonsidere pri la landlimoj. En ĉio ĉi la lingvo povas roli kiel rimedo por efektivi tiujn rajtojn – aŭ kiel obstrukcilo, se ĝi estas misuzata.

La sama temo estos pritraktita ankaŭ kiel interna temo. Diversaj kunsidoj pritraktos la rajton je komunikado interne de la Esperanto-movado: per korespondado, gazetaro, radio-elsendoj ktp.

SUBTENU la 62an Universalan Kongreson de Esperanto,

uzante sur viaj korespondaĵoj la allogan trikoloran glumarkon! Cent markoj kostas 8,25 (por Nederl. 9,60) gld., kio inkluzivas la sendokostojn.

Mendu ĉe via landa libroservo aŭ ĉe la Libroservo de UEA, Rotterdam.



Inter aliaj laborkunsidoj antaŭviditaj estas tiuj pri ekstereŭropa agado, agado ĉe UN, kultura agado, virina agado kaj diversaj kunsidoj de fakaj kaj neneŭtralaj organizaĵoj.

Ekskursaj dilemo

La dilemo de la plimulto de kongresanoj baldaŭ estos jena: Kiel entute decidiĝi pri elekto inter la multaj ekskursoj proponataj? Pli frue ni anoncis, ke okazos 3 duontagaj, 3 tuttagaj kaj 3 postkongresaj ekskursoj. Tamen, la fina programo antaŭvidas eĉ 5 postkongresajn variaĵojn... kaj ankoraŭ ekzistas la ebleco, ke la tuttagaj ekskursoj de la ekskursaj tagoj (merkredo) ripetigos ankaŭ postkongrese, se la interesiĝo estos tiel granda, kiel jam ŝajnas. Detalaj, ilustritaj priskriboj aperos en la Dua Bulteno.

Antaŭkongreso en Skotlando

Pere de la sama mendilo, per kiu la kongresanoj mendas la ekskursojn en Islando, ili povos sin anonci ankaŭ por la Oficiala Antaŭkongreso (sub aŭspicio de UEA), okazonta tuj antaŭ la UK en Stirling, Skotlando, kaj organizata de William Auld. Ĝi daŭros de la 14a horo en mardo, la 26a de julio, ĝis la vespero de vendredo, la 29a de julio (do NE ĝis sabato, kiel anoncite pli frue). Oni loĝos en unulitaj ĉambroj de la universitato, kie okazos ankaŭ la kunvenoj. Pri la ĝenerala temo "Esperanta kaj skota kulturoj" prelegos i.a. William Auld, Marjorie Boulton kaj Albert Goodheir. La kotizo de 160,— gld. inkluzivas la tranoktadon, maten- kaj vesper-manĝojn kaj programon. La ekskursojn necesos pagi ekstre. Ĉar la maksimuma partopreno estas 80 personoj, tuja sinanonco estas konsilinda – tamen nur post la apero de la Dua Bulteno. Per mendilo en tiu sama Bulteno eblos mendi ankaŭ la flugon de Glasgovo al Rejkjaviko kaj reen.

Ampleksa Dua Bulteno prespreta

La nekutime ampleksa – 40-paĝa – Dua Oficiala Bulteno de la UK estas jam prespreta kaj aperos komence de februaro. Ĝi estos tuj ekspedita al ĉiuj kongresanoj (al ekstereŭropaj aerpoŝte). La Bulteno enhavas i.a. detalojn kaj mendilojn pri hoteloj kaj aliaj loĝejoj, ekskursoj, antaŭkongreso, postkongresaj ekskursoj, bankedo, flugoj al Rejkjaviko, provizora programo kaj multaj aliaj aspektoj de la Kongreso. La kongresanoj estas afable petataj atendi la ricevon de la Bulteno, antaŭ ol skribi al LKK aŭ al Rotterdam pri siaj bezonoj.

Pli ol 750 aliĝintoj

Ĝis la mezo de januaro estis jam registritaj pli ol 750 kongresanoj, kiuj plejparte aliĝis antaŭ la fino de decembro.

Svislando

• La 18an de decembro 1976, en Gröningen, apud Zürich en Svislando, okazis baptoceremonio kaj la unua flugo de la varmaera balono "Esperanto", pri kiu oni en Svislando tamen jam tutan jaron kaj duonon. Kun volumeno de 1600m³, alteco de 18 kaj diametro de 15 metroj, la balono estis konstruita en Usono kaj financita per vendado de specialaj unuataĝaj filatelaj kovertoj (eldonkvanto 2500). La balono estas konstruita el nebruligebla nilono kaj oni intencas uzi ĝin por propagandaj celoj.

Rumanio

• En la urboj Kluĵo kaj Braŝovo lastatempe oni organizas kulturajn vesperojn por esperantistoj kaj neesperantistoj kune. La programoj estas dulingve prezentataj en la urbaj kulturdomoj. Bonvenus sendi eksterlandajn materialojn por tiaj programoj al: s-ro E. Schlesinger, str. Dr. Petru Groza 22, R-3400 Cluj-Napoca, aŭ al: s-ro Ion Sîrbu, Bd. Lenin 92 sc. C ap. 8, R-2200 Braŝov. En pluraj rumanaj urboj okazas Esperanto-kursoj.

Kostariko

• S-ro Carlos Salazar (Apartado 2128, San José, Kostariko) studis teknikon en Moskvo kaj tie konatiĝis kun Esperanto, kiun li poste praktikis dum sia dufoja restado en Uppsala (Svedio) kaj vojaĝo tra Hungario, Germanio, Belgio, Francio, Ĉeĥoslovakio kaj kelkaj aliaj landoj. Finstudinte, s-ro Salazar revenis al sia hejmlando kaj nun tie klopodas starigi landan Esperanto-movadon. Li jam instruas la lingvon al du grupoj, sed sentas mankon de instrukaj inform-materialoj.

FR Germanio

• Esperanto-Amikoj Mannheim-Ludwigshafen apartenas al la plej aktivaj lokaj grupoj en la lando. Pri la aktiveco de la grupo ofte raportas la loka kaj regiona gazetaro, radio kaj televido. Post la sukcesa gastigo de s-ro J. Grum, dum lia prelegvojaĝo (v. nian decembran n-ron, p. 208), la grupo nun planas organizi prelegvojaĝon de s-ino M. Haudebine, honora membro de UEA, kiu prelegos pri sia multjara laboro en Hinda Unio.

• Unu el la plej grandaj hotelaj entreprenoj en la mondo — "Holiday Inn" —, kiu ampleksas ĉ. 150 hotelojn, lastatempe komencas utiligi Esperanton en siaj reklamiloj. En la prospektoj pri la hoteloj en Frankfurt kaj Viernheim-Mannheim, eldonitaj en cent mil ekzempleroj, aperas germana, angla, franca, Esperanta kaj japana tekstoj.

Usono

• S-ro Ralph Harry, ambasadoro de Aŭstralio ĉe Unuiĝintaj Nacioj, estis gastiganto kaj ĉefa parolanto en festkunveno de novjorkaj esperantistoj, la 17an de decembro 1976, honore al la Zamenhofa Tago. Parolis ankaŭ la prezidanto de UEA, d-ro Humphrey Tonkin, kiu emfazis la gravecon de efika laboro por Esperanto en la urbo de la sidejo de UN, kaj d-ro J. Balbin, kiu deklamis kelkajn siajn poemojn.

Nederlando

• La 10an de decembro 1976 en Arnhem okazis publika diskuto (ĉ. 60 ĉeestantoj) pri la temo "La angla: Ĉu mondlingvo?". Por la angla pledis s-ro F. Schouten, nederlandano, kaj liajn asertojn kontraŭargumentis

d-ro V. Sadler, brito, direktoro de la CO de UEA, pledante siavice por "neŭtrala internacia lingvo" kiel Esperanto. Inter la ĉeestantoj, el kiuj plimulto inklinis akcepti la argumentojn de d-ro Sadler, troviĝis ankaŭ reprezentanto de la nederlanda Unesko-centro.

Portugalio

• Honore al la Zamenhofa Tago, inter la 13a kaj 17a de decembro 1976, en Lisbono, en la Palaco Foz, sidejo de la Portugala Turisma Oficejo, okazis granda ekspozicio de Esperantaj libroj kaj filatelaĵoj. La ekspozicio, kiun organizis propaganda sekcio de Portugala Esperanto-Asocio, vekis grandan intereson de la publiko. Inter la vizitantoj oni notis ankaŭ la portugalan ministrin pri sociaj aferoj, d-ron Armando Bacelar, kiu mem estas esperantisto.

Francio

• Inaŭgurita fine de 1976, la Domo de la paco, en Roubaix (Francio), oficiale malfermis konstantan ekspozicion kun aparta fako pri Esperanto.

• En la unuaj dek tagoj de julio 1977, esperantistoj partoprenos en la kongresoj de mondcivitanoj kaj mondfederalistoj en Parizo. (Informoj ĉe: G. Marchand, 45, rue des Morillons, F-75015 Paris).

Fake



La Estraro de ILEI kunsidis en Budapeŝto inter la 31a de decembro 1976 kaj la 5a de januaro 1977. Oni pridiskutis i.a. eblecojn eldoni sciencan materialon pri la eksperimento en la regiono unu (Italio, Jugoslavio, Bulgario, Hungario) kaj planojn fondi en Budapeŝto konsultan centron pri la pedagogia E-laboro en la orienteŭropaj landoj. Estas decidite, ke ILEI-konferenco ĉi-jare okazu en Luksemburgo inter la 14a kaj 24a de julio. Dum la kunsido en Budapeŝto okazis multaj renkontiĝoj kaj vizitoj al hungaraj pedagogiaj instancoj.

Lingvo-politiko

• La 14an de januaro 1977 okazis en Rietberg, apud Paderborn (FR Germanio), podia diskuto pri la temo "Eŭropa interkompreniĝo — en kiu lingvo?". La diskuton partoprenis: prof. d-ro H. Frank kaj parlamentano J. Hinrichs (liberala partio), s-ro K. Hachmann (social-demokrata partio), parlamentano H. Pohlmeier kaj rektoro C. Trimborn (kristana demokrata partio). Kvankam nur prof. Frank kaj rektoro Trimborn scias la Internacian Lingvon, post vigla kaj profunda diskuto de la lingva situacio en Eŭropo oni unuaniĝe akceptis jenajn du starpunktojn: 1) Gelernantoj en la 3a kaj 4a jaroj de la elementa lernejo ricevu lingvo-orientiĝan instruadon (Esperanto), kio jam okazas en 20 klasoj en la regiono de Paderborn; 2) Ekde la 7a lernojaro oni ne plu devigu ĉiujn gelernantojn lerni la anglan. Se montriĝas, ke ili malsukcesas en la lernado de la angla lingvo, ili havu eblecon anstataŭigi ĝin per Esperanto, plus la gepatra lingvo.

Interlingvistiko

• La venontaj seminarioj de Modern-Lingva Asocio de Usono (v. la paĝon 25), pri "Esperantaj lingvo kaj literaturo" kaj "Interlingvistiko", okazos en Ĉikago, inter la 26a kaj 29a de decembro 1977. La unua seminario verŝajne traktos temon pri kompara literaturo aŭ la Esperanta tradukarto. Proponojn pri referaĵoj oni direktu al: d-ro Dennis Q. McInerney (1001 W. Moss Av., Peoria, Ill. 61606, Usono). La seminarion pri interlingvistiko gvidos d-ro R.N. St. Clair kaj d-ro Richard E. Wood (Adelphi University, Garden City, N.Y. 11530, Usono), al kiu oni faru proponojn pri esperantlingvaj kontribuaĵoj.

Enketoj

• En sia referaĵo en la kadro de la 91a jara kunveno de Modern-Lingva Asocio de Usono (v. la paĝon 25), d-ro J. Balbin, profesoro en unu el la novjorkaj universitatoj, raportis pri la reagoj al lia enketo inter la membroj de la Akademio de Esperanto pri la termino "interlingvistiko". Estas interese, ke multaj akademianoj ne akceptas tiun terminon, sed preferas anstataŭe "esperantologio". Kelkaj el ili akceptas la terminon "interlingvistiko" nur kiel "trojan ĉevalon" por ruze enŝovi Esperanton

en la universitatojn. La akademiano Solzbacher, kiu ĉeestis la kunvenon de MLA atentigis, ke ĉi-rilate ne ekzistas oficiala starpunkto de la Akademio, sed temas nur pri personaj opinioj de la enketitaj akademianoj.

Instruistoj

• Antaŭ la 9a RIDEF (v. nian januaran n-ro, p.9) okazos en Artigues, ĉe Bordeaux, Francio, prepara kunveno de instruistoj, kiuj iros al la aranĝo en Lisbono. Inter la 2a kaj 14a de julio 1977, en la franca urbe to eblos eklerni Esperanton aŭ per-

fektiĝi en ĝia uzo. Oni povas partopreni ankaŭ nur parton de tiu "Antaŭ-RIDEF". Informas: S-ro Léo Robert, 11, rue des frères Lumière, F-33150 Cenon, Francio.

Prelegvojaĝoj

• S-ro Sergej Nikolaeviĉ Krajinov, agronomo, vicdelegito de UEA en Moskvo, dum 40 tagoj en 1976 faris plurajn dekojn da fakaj prelegoj en Bulgario. Li prelegis en Esperanto kaj en la rusa lingvo. Tri bulgaraj ministerioj, tri esplor-institutoj kaj ok urbaj Esperanto-organizaĵoj esprimis sin laŭde pri la prelegvojaĝo.

Persone

Rossetti

• *Monda karuselo*, kvaronjara Esperanta magazino (v. nian revuon, oktobro 1975, p. 168), kompletigis sian duan jarkolekton. En sia 8a n-ro *Monda karuselo* anoncas, ke la redaktadon de tiu periodaĵo ekde la unua n-ro por 1977 transprenos akademiano Reto Rossetti, unu el la plej konataj Esperantaj verkistoj.

Wood

• Prof. d-ro Richard E. Wood, redaktoro de *La monda lingvo-problemo* (ĝi ekde sia volumo 7 ŝanĝos la nomon al *Lingvaj problemoj kaj lingvo-planado*), gastredaktas numeron de alia grava lingvistika periodaĵo. Temas pri *International Journal of the Sociology of Language* (Internacia revuo de la lingvo-sociologio),

kiun ĉefredaktas prof. Joshua Fishman, mondrenoma lingvisto.

Ullman

• D-ro Pierre L. Ullman, profesoro en la Universitato de Wisconsin (Usono), aperigis en *García Lorca Review* (Vol. 4, n-ro 2, 1976, p.109 - 114) studon "Pri la *Romancero Gitano* en Esperanto". D-ro Ullman, fakulo pri poetiko, ekzamenas la tradukon de Fernando de Diego, eldonitan de Stafeto sub la titolo *Cigana romancero*, kaj atentigas pri Esperanto kiel perilo de la monda literaturo. Li dediĉas apartan atenton al la rolo, kiun en Esperanto ludas hispanaj tradukoj rilate la uzon de la poezia figuro asonanco. La menciitan revuon eldonas State University College, Brockport, N.Y. 14420, Usono.

Nekrologoj

EUGENIA MORARIU

Komence de januaro mortis en Cluj, Rumanio, la iama delegito de UEA, Eugenia Morariu (1904-1977). Ŝi lernis Esperanton kune kun sia frato Tiberio en 1921, en kurso de Andreo Cseh, kaj restis aktiva en la Movado dum la resto de sia vivo. Ŝiaj tradukoj el la rumana literaturo aperis i.a. en *Heroldo de Esperanto* kaj *La espero*.

ARTHUR EDMONDSON

La 9an de novembro, en Jorkŝiro, Britio, forpasis Arthur Edmondson (1899-1976), lerninta Esperanton

(1899-1976), lerninta Esperanton en 1928 kaj estinta unu el la plej aktivaj movadanoj en la urboj Bingley, Bradford kaj Keighley, kie li gvidis multajn Esperanto-kursojn. Kun sia edzino Ethel, ankoraŭ aktiva en la Movado, li membris en BEA kaj UEA dum kvardeko da jaroj.

ELLEN GREGORY

Nenjo Rimanto estas pseŭdonimo de Ellen Gregory (1891-1976), kiu forpasis la 2an de julio pasintjare, en Peasedown St. John, Bath, Anglio. Ŝi ekposedis la Internacian Lingvon jam antaŭ sia 20a jaro kaj

agadis por ĝi dum pli ol 65 jaroj. Ŝi talente instruis la lingvon kaj gvidis i.a. korespondajn kursojn. Al ŝiaj unuaj kaj plej sukcesaj lernantoj apartenis ŝia frato Mark Starr (kiun ŝi instruis jam en 1917), eminenta figuro en la internacia Esperanto-movado. Sub la plumnomo Nenjo Rimanto aperis pluraj Esperantaj libroj por junaj infanoj, interalie: *ABC-rimoj por etuloj* (1953), *El Kornvalo* (1958), *Juveloj* (1965) kaj *Versoj por infanoj* (1966).

DAVID ARMAND

La 29an de novembro 1976 en Moskvo forpasis prof. David Lvoviĉ Armand (1905-1976), elstara soveta geografo, aŭtoro de pli ol 700 sciencaj studoj, unu el la pioniroj de naturdefendo, elstara aganto de soveta Esperanto-movado. Dum vico da jaroj li plenumis taskojn de FD pri geografio, de vicprezidanto de la geografia sekcio de ISAE, estis vicprezidanto de Moskva Komisiono pri Internaciaj Ligoj de Sovetaj Esperantistoj, partoprenis kelkajn Universalajn Kongresojn, la lastan — en 1974 en Hamburgo — kaj prelegis en Internacia Somera Universitato. Homo de granda persona ĉarmo, li grave kontribuis al la evoluo de la



enlanda Esperanto-movado kaj multon faris por edukado de nova generacio de soveta esperantistoj.

JEAN CHAPELLIER

La 26an de decembro apud Metz, Francio, forpasis Jean Chapellier, multjara membro (de 1937) de UEA, delegito kaj fakdelegito pri fervojoj en Nancy, konsiliano de UFE dum pli ol 25 jaroj. Li ĉeestis preskaŭ ĉiujn universalajn, fervojistajn, francajn kaj ofte katolikajn kaj italajn Esperanto-kongresojn post la lasta mondmilito.

Nîmes; Jean-Marie Guillon, VD kaj FD (juro), Orléans; Jean-Pierre Peray, FD (teatro), Paris; Raymond Doury, VD, Paris; François Lo Jacomo, JD, Paris; Luis Lazaro, FD (scientologio kaj dianetiko), Paris; Sonia Amariglio, FD (kemio pri lakto-produktoj), Paris; André Loisel, D, Rouen; Edgard Jouis, VD, Rouen; Pierre Lemarchand, FD (konstruado: maraj laboroj), Rouen; Jean-Claude Bourgeat, D, Saint-Puy; Lionel Venon, D, Selles sur Cher; Jean-Paul Beau, D, Velaux; André Debertonne, FD (SOS-aŭtoservo), Versailles kaj D, Ville d'Avray.

NE PLU VALIDAS

(pro adresŝanĝoj aŭ aliaj kaŭzoj) la informoj pri la jenaj delegitoj en la Jarlibro 1976:

ĈEĤOSL: Prostějov, FD (studentaj aferoj). FRANC: Paris, D, JD, FD (asekuro), FD (filozofio: rozkrucismo), FD (framasonismo), FD (universitatoj popolaj). JUG: Skopje. KOR. RESP.: Seoul, VD. NED: Bunnik. SOV: Minsk, VD. SVED: Skövde, FD (komerco).

NOTO; Tio ĉi estas la lasta fojo, ke vi vidas la rubrikon NE PLU VALIDAS en ĉi tiu revuo. Konsiderante la fakton, ke tre malmultaj membroj utiligas ĉi tiujn informojn, la Estraro de UEA decidis, ke ili ne plu okupu spacon en la revuo.

Oficiala Informilo

N-ro 504, 1976 12 31

ELEKTO DE KOMITATANOJ B:

EN ĈI TIU REVUO, oktobro 1976, p. 159, aperis anonco pri la elekto de komitatanoj B de UEA por la oficperiodo 1977-1980. La nombro de komitatanoj B estas difinata surbaze de la nombro de la ĉefdelegitoj kaj delegitoj (ne vicdelegitoj kaj fakdelegitoj) en la fino de la antaŭelekta jaro. La Centra Oficejo nun informas, ke la nombro de la ĉefdelegitoj kaj delegitoj je la 31a de decembro 1976 estis 1194. El la artikolo 28(a) de la Ĝenerala Regularo de UEA sekvas, ke la nombro de komitatanoj B elektoblaj estas KVIN.

NOVAJ DELEGITOJ

Konforme al la artikolo 11 de la Ĝenerala Regularo de UEA, ni publikigas la nomojn de la nove nomitaj delegitoj de UEA. Se ĝis la dato 1977 04 15 neniuj membroj pro grava kaŭzo protestos, la nomigo fariĝos valida.

BRAZ: Ursula Grattapaglia, FD (parapsikologio), Alto Paraiso; Jair Sales, FD (religio: evangelia kristanismo), Rio de Janeiro. ĈEĤOSL: František Arnošt, FD (lingvoj: ĉeĥa kaj Esperanta), Prostějov; Helena Arnoštová, FD (muziko kaj kantado), Prostějov. DANL: Kim Jan Henriksen, JD, København. FRANC: Pierre Laurent, D, Angoulême; Simone Humm, FD (turismo), Avignon; Léon Goudé, D, Baugé; Raoul Melo, D, Bellerive sur Allier; Jean Luc Tortel, D kaj FD (medicino: relertigo), Berck-Plage; Pierre Royer, D kaj FD (juro), Chatou; Etienne Gaudry, D kaj FD (framasonismo kaj rozkrucismo), Clamart; Jacqueline Chéfd'Homme, D, Dax; René Bastong, D kaj FD (aŭtomobilismo), Les Clayes sous Bois; Marcel Moreau, D, Libourne; Gaston Trémon, FD (kolektado: glumarkoj), Limoges; Joseph Catil, VD, Lyon kaj D, Meyzieu; Jean P.R. Juzan, D, Mont de Marsan; Robert Llorens, D, Nice; Georgo Salan, FD (medicino),

DONACOJ 1976 (Gld.)

ELDONA FONDAĴO: Jugoslavio: Mile Todorović 4,27. Sumo ĝisnuna 13,77.

FONDAĴO CANUTO: FR Germanio: Astrid Hanke, Walter Gscheidl, Heinz Mielke, Otto Peine, Karl Simon, Emmi Stox, M. von Waldowski, W. von Waldowski, Louis Beaucaire, Werner Bernhardt kune 250,82; W. Mutschler 52,09; J. Jazaki 31,25; G. Brinkmann 31,26. Kostariko: J.E. Falk 30,62. Sumo ĝisnuna 5360,36.

FONDAĴO AZIO-AFRIKO: Francio: Claude Martins 5,00. Sumo ĝisnuna 693,56.

ĜENERALA KASO: Britio: H. Davies 20,68. FR Germanio: Marie Laade 800,00; U.J. Moritz 10,16; I. Pahnrich 5,23. Nederlando: W. B.P. Blomme 10,00; A. Kriek 75,00. Svislando: V. Pytloun 5,20. Sumo ĝisnuna 6180,84.

Al ĉiuj tre koran dankon! UEA

ekzameno



Redaktas: B. Golden,
Csikász u. 11.III.3
H-8200 Veszprém, Hung.

RESPONDO 8

(pri la demando v. nian januaran numeron, p.19)

a. **Leopold Einstein** (1834-1890). Germana volapukisto, kiu tre fervore propagandis la lingvon de Schleyer ĝis 1888, kiam li konatiĝis kun Esperanto. Li tuj aliĝis al la nova movado, verkis germanlingvajn propagandajn broŝurojn kaj gazet-artikolojn kaj varbis por Esperanto la Nurenbergan Mondlingvan Klubon (antaŭe ĝi estis volapukista klubo).

b. **Józef Waśniewski** (1859-1897). Pola ĵurnalisto kaj poeto, pioniro de la Esperanto-movado en Pollando. Lia premiita novelo *En la brikejo* (1896) estas la plej altnivela verko de la unua generacio de la Slava Skolo. Li estis la unua, kiu entreprenis gravajn vojaĝojn interesperantistajn.

c. **Wilhelm Heinrich Trompeter** (1839-1901). Mineja termezuristo el Schalke (Vestfalia), Germanujo. Li esperantistiĝis en 1888, aperigis germanlingvajn lernolibron kaj vortaron kaj fariĝis mecenato de Esperanto, kiam li finance subtenis

la eldonadon de la revuo *La Esperantisto* dum tri jaroj (1892-1894).

ĉ. **D-ro Emile Javal** (1839-1907). Eksparlamentano en Francujo, membro de la Akademio pri Medicino, eminenta oftalmologo kaj persona amiko de d-ro Zamenhof. Li daŭre konsilis al Zamenhof pri la disvastigo de Esperanto en Francujo. Li provizis monon por la Centra Oficejo en Parizo, kiun generalo Sebert administris.

d. **Carlo Bourlet** (1866-1913). Doktoro pri sciencoj, profesoro pri mekaniko, verkinto de matematikaj libroj. Dank' al lia influo, la granda franca eldonejo Hachette entreprenis la publikigadon de Esperanto-libroj. En 1906 Bourlet fondis *La Revuo*, en kiu aperis multaj tradukaĵoj faritaj de d-ro Zamenhof.

DEMANDO 9

(la respondo aperos en nia marta numero)

D-ro Zamenhof dediĉis sin ne nur al la ellaborado de sukcesa planlingvo, sed agadis ankaŭ sur najbara lingva tereno — lingvo-reformo. Li verkis gramatikon kaj proponis novan ortografion por vaste parolata eŭropa lingvo.

A. Pri kiu lingvo temas? B. Kiajn reformojn proponis Zamenhof? C. Kiel rilatis tiu lingvo al la laboro de la patro de Zamenhof? Ĉ. Kiam estis publikigita la unua traduko el tiu lingvo en Esperanton, kiel nomiĝas la verko kaj la aŭtoro, kaj kiu tradukis ĝin? D. Kiu ĉiutaga radiko en Esperanto havas originon en tiu lingvo?

Héctor A. Vanolli, 21-jara, Hipolito Irigoyen 180-1-D, 4400 Salta, Argentino, deziras korespondi tutmonde.

Fam. H.G. Beverloo, Heelalstr. 42, Dordrecht, Nederlando, deziras al ĉiu feliĉan 1977.

Interŝanĝas pk, pm, eventuale informojn pri socia leĝaro: P.I. Ereno, Banierstr. 82a, Rotterdam, Nederlando.



Hungara apotekistino petas diapozitivojn pri la temo: Farmacihistorio, t.e. malnovaj apotekoj, vazoj, iloj, ktp. **Ida Palovits**, Beloiannis u. 11/a, H-5600 Békéscsaba, Hungario.

Malnovaj Esperanto-revuoj interesas min: **Ramon Molera**, Moyá (Barcelona), Hispanio.

Blinduloj kaj vidantoj, kune lernantaj Esperanton kadre de plurjara instrueksperimento, deziras korespondi tutmonde. Diversaj laborgrupoj: geinfanoj, geknaboj, plenaĝuloj. Dezirataj kontaktoj precipe kun unuagrada lernejoj, organizaĵoj, unuopuloj por kunordigo de instruaktiveco kaj sekvaj infanrenkontiĝoj. Adresu: Scuola Elementare Statale, Istituto Ciechi, viale Ignazio 100, Cagliari, Italio.

Ni volas korespondi pri kampado, pm., aŭto-turismo kun s-anoj en Eŭropo. Ni estas 43-jaraj kaj havas 3 infanojn. **Fam. H.G. Beverloo**, Heelalstr. 42, Dordrecht, Nederlando.

S-ro Marc Blondeel, 22, rue Claude Debussy, F-59130 Lambersart, Francio, ŝatus korespondi kun esperantistoj el la tuta mondo pri interŝanĝo de poŝtmarkoj.

Anoncetoj


TARIFO: Ĉiu vorto kostas 0,75 gld. (1 internacia respondkupono). Pri la enhavo de la anoncetoj respondecas nur la anoncantoj.

Vigla kaj gaja svedino, 50-jara, dezirus korespondi kun esperantistoj en Eŭropo. Miaj intereso: la naturo, muziko kaj korespondado. Skribu al mi kaj vi certe ricevos respondon: **Anne-Marie Lundqvist**, Dalviksringen 2, S-55 260 Jönköping, Svedio.

Mondprelegvojaĝo komencita en 1949, daŭrigota en 1977 (ĝis nun 5000 prelegoj!). Temoj: 1. Egiptujo

(kun belegaj kolorbildoj); 2. Pozitiva pensado kondukas al feliĉego! Invitoj bonvenaj precipe el Azio kaj Ameriko. Samtempe mi serĉas sekretariinon, vegetaraninon. Prof. d-ro **Tadros Megalli**, D-8381 Rossbach, FR Germanujo.

Ŝekspiro, *Epifanio* (Twelfth Night), trad. William Auld, £1.80 (inkl. sendkostojn). Eldono de **KARDO**, 16 Woodlands Drive, Coatbridge ML5 1LE, Skotlando. Samadrese: **R.L. Stevenson**, *Forkaptita* (Kidnapped) £2.25; Eŭripido, *Bakĥantinoj* £1.20; **A. Goodheir**, *Merlo sur Menhiro*, poemaro, £0.85.



Esperanto en radio

Ĉiujn informojn pri radio bv. sendi al s-ro G. Larglantier (redaktoro de ĉi tiu rubriko), 29, Bd. Murat, F-75016 Paris, Francio. En la tabelo, la horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon. Aliajn horsistemojn v. en la Jarlibro 1976, p. 66-67. Mal-longigoj: I = informoj, P = Parolado, K = kurso.

Ĉiutage

05.00-05.30 Varsovio, 200m (1502 kHz), 75.84m (3955 kHz), 50.04m (5995 kHz), 48.90m (6135 kHz), 41.27m (7270 kHz). I.P. Pola Radio, Esperanto-Redakcio, Poŝkesto 46, PL-00950 Warszawa, Pollando.
15.30-16.00 Varsovio, 41.99m (7145 kHz), 31.45m (9540 kHz), 25.42m (11800 kHz). I.P.
21.30-22.00 Varsovio, 200m (1502 kHz), 75.84m (3955 kHz), 50.04m (5995 kHz), 41.27m (7270 kHz)

Dimanĉe

05.45-05.55 Vieno, 48.74m (6155 kHz), 41.64m (7205 kHz), 16.85m (17800 kHz). I. P. ORF Esperanto, P.O.B. 700, A-1041 Wien, Aŭstrio. Ripeto de la antaŭa sabata programo.
10.30-10.40 Muritiba, 190m (1580 kHz). I. K. Soc. Em. Radiovox, Muritiba (Bahia), Brazilo.
11.00-11.30 Pekino, 43.35m (6920 kHz), 40.82m (7350 kHz). I. Radio Pekino, Esperanto-Fako, Pekino, Popola Respubliko Ĉinio.
12.30-13.00 Pekino, 31.95m (9390 kHz), 25.04m (11980 kHz). I.
20.00-20.20 Romo, 49.92m (6010 kHz), 41.24m (7275 kHz), 41.15m (7290 kHz). P. Radio Roma, Esperanto-Fako, Casella Postale 320, I-00100 Roma, Italio.
20.05-20.15 Vatikano, 196m (1529 kHz), 48.47m (6190 kHz), 41.38m (7250 kHz), 31.17m (9625 kHz), 25.63m (11705 kHz), 19.84m (15120 kHz). I.P. Radio-vaticana, Esperanto-fako, 00120 Città del Vaticano.

Lunde

00.00-01.00 Sorocaba, 278m (1080 kHz). Rádio Clube de Sorocaba, rua São Bento 190, BR-18100 Sorocaba, S.P., Brazilo.
12.20-12.30 Berno, 75.28m (3985 kHz), 48.66m (6165 kHz), 31.46m (9535 kHz), 19.82m (15140 kHz), 19.44m (15430 kHz), 16.83m (17830 kHz), 13.94m (21520 kHz). P. (d-ro A. Baur). Svisa Kurtonda Radio,

Esperanto-Fako, CH-3000 Bern 15, Svislando.

Marde

12.10-12.20 Gdańsk, 66.29 MHz (mod. frekv.). Ripeto, dek tagojn poste, de la sabata programo el Varsovio, unu fojon monate.
17.35-17.45 Vieno, 203m (1475 kHz). P. (Ĉiun kvaran mardon).
20.30-20.45 Ibra Radio, per ondoj de Radio Mediteranea en Malto: 48.62m (6170 kHz). I. Ibra Radio, Box 396, S-101 25, Stockholm, Svedio.
21.35-21.45 Berno, 75.28m (3985 kHz), 48.66m (6165 kHz), 31.46m (9535 kHz), 31.28m (9590 kHz), 25.60m (11720 kHz), 25.27m (11870 kHz).
Ripeto de la lunda programo.

Merkredo

12.20-12.30 Berno; ondoj, kiel lunde. P. (s-ro Gacond).
19.30-19.45 Sabadell, 203m (1475 kHz). I.K. Radio EAJ 20, Sabadell, Hispanio.

Ĵaŭde

21.35-21.45 Berno, ripeto de la lunda programo; ondoj, kiel marde.

Vendrede

12.20-12.30 Berno, ripeto de la merkreda programo per samaj ondoj.
16.00-16.15 Romo, 104 MHz (mod. frekv.). K. Radioroma, loka privata stacio.
20.00-20.30 Pekino, 47.85m (6270 kHz), 43.73m (6860 kHz), 31.98m (9380 kHz). I.
23.05-23.20 Zagrebo, 264m (1163 kHz). P. Radio Zagreb, Esperanto-Fako, Jugoslavio.

Sabate

00.10-00.20 Varsovio, 1321m (227 kHz). P. Programo preparita de Pola Radio, ul. Uphagena 1, Gdańsk-Wrzeszcz, Pollando; ĝi okazas unu fojon ĉiumonate dum muzika programo.
11.00-11.30 Pekino, kiel dimanĉe.

12.30-13.00 Pekino, kiel dimanĉe.
16.45-16.55 Vieno, 48.74m (6155 kHz), 16.87m (17780 kHz). I.P.
20.00-20.30 Pekino, kiel vendrede.
21.35-21.45 Berno, ripeto de la merkreda programo; ondoj, kiel marde.
22.00-22.15 Valencio, 358m (836 kHz). P. La Voz de Levante, Valencia, Hispanio.

RADIO VARSOVIO, krom la ĉi-supre anoncita ĉiutaga programo, prezentas "Anguleton por esperantistoj": 1) dum la germanlingvaj programoj dimanĉe de la 21.00 ĝis la 21.30 per ondoj 49.22m (6095 kHz), 42.11m (7125 kHz), 41.18m (7285 kHz); 2) dum la svedlingva programo ĉiun duan mardon de la 16.00 ĝis la 16.30 per ondoj 200m, 75m, 49m, 41m; de la 19.30 ĝis la 20.00 per ondoj 49m, 41m; de la 21.00 ĝis la 21.30 per ondoj 200m, 75m, 49m, 41m; 3) dum la danlingva programo sabate de la 15.30 ĝis la 16.00 per ondoj 200m (1502 kHz), 75.84m (3955 kHz), 49.22m (6095 kHz), 48.90m (6135 kHz).

ĜENERALA AŬDEBLECO

a) Stacioj nur loke aŭdeblaj (nur en la lando mem, kelkaj nur en la urboj): Muritiba, Sabadell kaj ĉiuj elsendoj per modulita frekvenco.
b) Stacioj aŭdeblaj en Eŭropo kaj mediteraneaj landoj: Berno (75.28m, 48.66m, 31.46m), Pekino (vesperaj elsendoj vendrede kaj sabate), Romo, Valencio (en la suda Eŭropo), Varsovio, Vatikano (196m, 48.47m, 41.38m), Vieno (203m, 48.74m), Zagrebo, Ibra Radio.
c) Stacioj aŭdeblaj en Azio kaj Ameriko: Pekino (dimanĉe kaj sabate je la 11.00 kaj 12.30 GMT), Sorocaba (en Brazilo kaj najbaraj landoj), Vieno (41.64m, 16.85m en la sudorienta Azio).
ĉ) Stacioj aŭdeblaj en Afriko kaj la orienta parto de Nord-Ameriko: Berno (31.28m, 25.60m, 25.27m, 19.82m, 19.44m, 16.83m, 13.94m), Vatikano (31.17m, 25.63m, 19.84m).

fariĝu domposedanto

Per aĉeto de akcioj vi realigas novan internacian kulturdomon. — "Esperanto-Centro D-ro Zamenhof". Informojn petu ĉe: s-ro Sudec, Wandsbeker Chaussee 155, D-2000 Hamburg 76.

SE VI SERĈAS SERIOZAJN KORESPONDANTOJN, ĉu individuajn, ĉu sur kolektiva bazo (ekz. por lernejo), turnu vin al la **KORESPONDA SERVO** de UEA. Adreso: K.S.M., 12 rue des Jacobins, F-63000 Clermont-Ferrand, Francio.

KRUKO KAJ BANIKO EL Bervalo



ANKORAŬ HAVEBLAS la jam (fi)fama anekdotaro de Louis Beaucaire.

Tiu vigle ilustrita originala ridincitilo kun la subtitolo "Maldecaj anekdotoj por neprudaj legantoj" tiel furoris tra la mondo, ke la unua eldono el 1970 jam post nuraj ses monatoj estis havebla nur prunte aŭ ŝtele. Sed nun vi povas aĉeti kaj posedi propran ekzempleron.

Mendu ĉe la Libroservo de UEA. Prezo: 16,— (por Nederlando 16,64) guldenoj.

ĈU TEMO POR LANDAJ ESPERANTO-KONGRESOJ?

Logika ĉeno:

registaro serĉas problemsolvon
esperantisto ĝin prezentas racie en esperanto
registaro ne regas esperanton
necesas traduko far enlandaj esperantistoj
por eviti multfojan tradukadon, necesas centri la laboron en la landa asocio
nur ĝi plej efike povas prezenti la problemsolvon al registaro per solena rezolucio

La temo: Senriproĉa monda monsistemo. öS 45,— al poŝta ĝirkonto 7 503.218. Dr Josef Hartl, Vieno.

ĴUS APERIS

NIA ORIGINALA PROZO de H. Apolloner, 58p. Grava kaj instrua verko pri preskaŭ ĉiuj originalaj verkoj de Esperanto. 10,— dkr.

KIEL AKVO DE L'RIVERO, represo de la ĉefverko de R. Schwartz, 2 volumoj, 488p., originala romano. Du ĉefpersonoj: li (franco) kaj ŝi (germanino) antaŭ, dum kaj post la du mondmilitoj. 50,— dkr.

Baldaŭ aperos **VENIS VIRO** de la dana verkisto Torben Nielsen, tradukita de G. Riisberg. Venis viro telefone vokita de sia filo, kiam tiu antaŭvidis fatalan katastrofon. 75p. 15,— dkr.


Mendu la librojn ĉe la libroservo de via lando, ĉe UEA aŭ ĉe la eldonejo: Dansk Esperanto-Forlag, Ingemannsvej 9, DK-8230 Aabyhøj, Danlando.

Petu la libroliston de la eldonejo (senpage).

La legolibro, kiun ni plej bezonis



Novspeca legolibro enhavanta 20 dialogojn kun 2000 konversaciaj frazoj, parolturnoj, demandoj kaj respondoj kaj kun 20 tutpaĝaj humuraj ilustraĵoj. La tekstoj estas laŭgrade aranĝitaj.



Verkita en simpla stilo por faciligi al novaj lernantoj paroli la Internacian Lingvon

141 pj.
Poŝformata (22 x 12 cm)

Verkis: Albert Lienhardt. Ilustris. Arfoll. Eldonis: Universala Esperanto-Asocio, Rotterdam, 1973.

Prezo: 4,50 (por Nederlando 4,68) guldenoj, plus sendokostoj 10%. Rabato revendista: 33,3% ĉe mendo de minimume 3 ekzempleroj.

LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando

En la Centra Oficejo de UEA
en Rotterdam
estas libera loko por
juna, energia


TIPOGRAFO/PRESISTO

kiu — post enkonduka periodo —
memstare gvidos grafikajn laborojn en
la C.O. (rilate al eldonprojektoj, kom-
postado, grafikaj aranĝoj, foto- kaj
filmlaboroj, ofseta presado k.a.).

Al la ĝusta persono la C.O. ofertas
interesan okupon kun bona salajro kaj
sociaj asekuoj, loĝeiperadon kaj mult-
flankan laborterenon en internacia
sfero.

Kandidatoj sin turnu kiel eble plej
baldaŭ al la ĝenerala direktoro de la
C.O. de UEA, Nieuwe Binnenweg 176,
Rotterdam-3002, Nederlando.

Nun en nova vesto:



ANGLA ANTOLOGIO

1000-1800

Red. Auld kaj Rossetti

319p. broŝurita 13,50 gld.

Granda antologio de granda literaturo



"Post nun jam dufoja tralegado de la libro mi povas nur diri, kaj ripeti, ke ĝi estas treege
valora volumo por la Esperanto-movado en ĝia tuteco kaj por ĉiu unuopa esperantisto, kaj
aldoni mian deziron, ke la unua eldono rapide elĉerpiĝu, kaj ke ĝin sekvu ankoraŭ multaj
eldonoj kompletigaj."

Teo Jung

Verkis Ivo Lapenna (ĉefred.), Ulrich Lins (red.) kaj Tazio Carlevaro. Eldonis UEA (Centro de Esploro kaj
Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo). 876p. 20,5 x 14 cm. 65 ilustraĵoj. 40 indeksopaĝoj.
Prezo: 84,— gld. (por Nederlando 87,36 gld.) plus sendokostoj 10%. Ĉe la Libro servo de UEA.